der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

25. Jahrgang Nr. 155 3/1989 ISSN 001 4-0619 30 Pf

Germana Demokratia Respubliko — 40 jara

Jubileoj invitas bilanci. Fojfoje bilancoj estas ekvilibraj, fojfoje malpli.

Ni ne prezentu ĉi tie bilancon. Sed eble ni atentigu pri kelkaj faktoj, kiuj tute ne plu estas memkompreneblaĵo en nia hodiaŭa mondo. Post 40 jaroj da ekzisto de nia ŝtato, da ekzisto, cetere, malfacila kaj daŭre obstrukcita, oni povus resumi:

La laborista klaso, en alianco kun kamparanoj kaj intelektularo, kune kun ĉiuj laboruloj, ja kapablas gvidi modernan industrian ŝtaton. La ĝis nun daŭre progresa evoluo, malgraŭ problemoj kaj malfacilaĵoj tamen progresa kaj stabila, pruvas, ke la socialismo kapablas ligi socialan progreson kun ekonomia prospero. Tio signifas:

1. En GDR ne ekzistas senlaboruloj, eĉ kontraŭe, mankas laboruloj en multaj sferoj de la ekonomio, administrado, servoj k.s.

2. En GDR ne ekzistas rabistaj luprezoj kiel aliloke. Ĝenerale post malmultaj jaroj juna paro havos sian loĝejon kaj ne pagos pli ol 2-3 procentojn de sia salajro.

3. Kompreneble la socialaj prizorgoj, kuracado k.s. estas senpagaj.

4. Daŭre stabilas la prezoj por a) bazaj nutraĵoj, b) servoj, c) trafiktarifoj. Tio evitas suferon de ekonomie malfortaj tavaloj (ekz. la pensiuloj).

5. En GDR realiĝas senprecedenca programo de loĝejkonstruado, tiel, ke 1990 la loĝejproblemo povos esti rigardata kiel principe solvita, solvita kiel sociala problemo.

6. Ekzistas tuta sistemo de aparta subtenado de junaj geedzaj paroj, de junaj patrinoj.

7. La krimeco en GDR, kvankam ja ekzistanta, tamen apartenas al la plej malgranda en la hodiaŭa mondo. Drogokonsumado ne ekzistas kiel sociodetrua fenomeno.

Ĉu ĉio ĉi signifas, ke ni jam konstruis perfektan socion? Ne, kaj ankoraŭfoje ne. Certe, ofte, tro ofte oni elstarigas precipe la atingitajn sukcesojn, forgesante, mencii niajn problemojn. Ili abundas. Sed ĉar ie fariĝas modo, deklari, ke la socialismo ne multon atingis, fiaskis k.s., ni ĉifoje sentis la bezonon atentigi pri kelkaj fundamentaj atingoj. Bone, kaj post tio ni transiru al la solvado de niaj problemoj.

Detlev Blanke

Kiel organizi sciencan esploron pri Esperanto? Taktikaj kaj organizaj aspektoj (Surbaze de spertoj en GDR)

1. La estonteco de Esperanto dependas de objektivaj kaj subjektivaj faktoroj:

1.1. Al la **objektivaj faktoroj** apartenas i.a.:

a) la kreskanta bezono de pli racia kaj pli demokratia internacia lingva komunikado, b) la direkto de la monda politika evoluo, ebliganta tendence pli demokratian reguligon de la internaciaj rilatoj, c) la konkrete politika, ekonomia kaj lingvopolitika situacio de difinita teritorio, kie agadas la Esperanto-movado, d) la lingva kvalito de Esperanto (kiu pruviĝis sufiĉa por la rolo de internacia komunikilo).

1.2. Al la **subjektivaj faktoroj** apartenas i.a.:

a) la ĝenerala nivelo de la internacia Esperanto-movado (inkluzive de la landaj movadoj), kvante kaj kvalite, kiu inkludas la kapablojn aŭ malkapablojn de la gvidaj aktivuloj de la movado, b) la kapablo de la movado sin efike (aŭ malefike) prezenti eksteren (antaŭ politikaj, sciencaj aŭ aliaj rondoj), c) la strategia kompreno de la movado pri la dialektika unueco de **teoria esploro** kaj prezento pri Esperanto kaj la **praktika apliko** de la lingvo d) la subjektiva sinteno (pozitiva aŭ negativa) de difinitaj politikaj enfluhavaj personoj. Kompreneble, ĉiuj faktoroj en la du grupoj estas iel ligitaj kaj sin parte kondiĉigas reciproke.[1])

2. Konkretajn decidojn pri iuj paŝoj rilate la lingvopolitikon en iu lando aŭ regiono tre forte influas politikaj kaj ekonomiaj potencoj. Ili, do la ŝtato, partioj, industriaj instancoj aŭ internaciaj organizaĵoj nepre konsultos antaŭ siaj decidoj la sciencistojn. Tio ankaŭ validas por la problemo de la disvastigo aŭ (estonte eventuale) enkonduko de internacia planlingvo en difinitajn sferojn de la internacia komunikado. Se la objektivaj faktoroj favorigus aŭ eĉ necesigus seriozan okupiĝon pri la mildigo aŭ solvo de la internacia lingvo-komunikada problemo, kaj la sciencistoj havus ekz. pri Esperanto opinion aŭ vidpunkton, kiu ne kongruas kun la faktoj, la solvopropon plej verŝajne ignoras la multjardekajn spertojn, pri kiuj disponas la Esperanto-komunumo. Partaj nuntempaj atingoj en kelkaj landoj, kie la atentinda sukceso de Esperanto ne nepre baziĝas sur seriozaj esploroj kaj ekspertizoj, ne trompu nin. Sub certaj historiaj kondiĉoj kaj la efiko de favoraj subjektivaj faktoroj tio eblas. Tamen, por atingi daŭran kaj stabilan sukceson nepre necesas la subteno de la sciencistoj, de la altlernejoj kaj universitatoj, de la sciencaj akademioj kaj lingvistikaj institutoj.
Pri tio la plej multaj landaj Esperanto-asocioj ne konscias. Mankas en la plej multaj landoj kondiĉoj por scienca prezento de Esperanto.

3. Kio signifas „scienca prezento de Esperanto?" Oni devas distingi tri problemarojn:

3.1. Necesas la scienca esploro kaj prezento de la internacia lingva problemo kun ĉiuj siaj aspektoj (politika, ekonomia, lingvistika, jura, psikologia, informadteoria, pedagogia k.a.). Do ne Esperanto, sed la lingva problemo estas en la centro de la atento.
Kiam en 1969 Ivo Lapenna fondis la antaŭulon de la nuntempa revuo „Language Problems and Language Planning", li nomis ĝin „La monda lingvo-problemo" (eldonita ĉe Mouton, Den Haag, ĝis 1977). Sur la kovrilo oni trovis kelkajn de tiuj aspektoj menciitaj, nome „socia, lingvistika, politika, jura, psikologia, ekonomia". Laŭ mia koncepto ĉio ĉi estas la objekto de interlingvistiko.
Oni havas pli da ŝancoj trovi intereson pri planlingvoj ĝenerale, kaj

aparte pri Esperanto, se oni konsciiĝas pri la ekzisto de tutmonda lingvokomunikada problemo. Multaj homoj, ankaŭ sciencistoj, simple kontestas la ekziston de tiu problemo. Laŭ ilia simplisma kompreno la angla solvis la problemon. Pri tiu problemaro ekzistas jam abunda Literaturo, kvankam sufiĉe heterogena kaj dissemita.[2])

3.2. La dua problemgrupo koncernas la fenomenon de laŭplane, konscie kreita lingvo, do „planlingvo". Necesas montri, ke tia lingvo povas ekzisti kaj funkcii. Oni povas science priskribi la diversajn provojn, klasifiki ilin kaj diskuti pri la ecoj de tia planlingvo aŭ eĉ prezenti novajn sistemojn. Ekzistas abunda literaturo. Oni povas diri, ke pri tiu problemaro okupiĝas subdisciplino de la interlingvistiko, la planlingvistiko. Por iuj aŭtoroj, kvankam laŭ mi malprave, ĝuste ĉitiu problemaro estas la vera objekto de interlingvistiko.

3.3. Kaj nur la tria problemgrupo koncernas la sole funkciantan planlingvon: Esperanto. Se oni esploras la fortojn, strukturon, evoluon kaj komunikkapablojn (praktika apliko) de Esperanto, ĉiam en kunteksto kun ĝia parolantaro, oni okupiĝas pri esperantologio[3]).

3.4. Sciencstrategie pruviĝis taŭga la aliro al la triopo: monda lingvoproblemo → planlingvoj → Esperanto. Sed ankaŭ eblas procedi alimaniere. Oni ankaŭ povas eliri de la lingvistike ne ignorebla faktos, ke ekzistas funkcianta planlingvo. Oni do esploros la diversajn demandojn kaj problemojn, kiujn tiu fenomeno devigas rekoni. Tiam, almenaŭ provizore, forfalas 3.1.

Al la interesaj aspektoj apartenas i.a.:

— la fenomeno de la konscia interveno de la homo en la lingvoevoluon (lingvoplanado)
— tipologio de planlingvoj kiel spegulo de semiotikaj kaj lingvistikaj skoloj kaj tendencoj.
— praktika valoro de la aplikata planlingvo (= Esperanto)
— klerigaj kaj edukaj valoroj de Esperanto (i.a. la propedeŭtika aspekto por la lernado de aliaj fremdlingvoj, la valoro de Esperanto por la internacia popola amikeco, internaciismo k.s.)
— valoro de planlingvoj ĝenerale kaj de Esperanto aparte por la ĝenerala lingvoscienco.

Fakte en GDR ni komencis 3.2. → 3.3. kaj nun aldonos 3.1. Unue aperis disertacio, kiu montris la funkcikapablon de Esperanto[4]), poste sekvis libro pri la tuta problemaro de planlingvoj[5]).

4. Oni povus demandi sin, kiu stimulu la esploradojn pri interlingvistiko kaj esperantologio (laŭ la sencoj 3.1. — 3.3.) en landa skalo. Verŝajne la landaj asocioj devas fari la komencon. Tio ŝajnas unurigarde neebla. En multaj landoj mankas interesitaj kaj engaĝiĝemaj (pri la temoj) lingvistoj, ĝenerale pro tio, ĉar ili ne konas seriozajn publicaĵojn. Kaj ĉar tiuj ofte mankas, ne interesiĝas lingvistoj. Kaj ĉar mankas interesiĝantaj lingvistoj, ne aperos publicaĵoj kaj aliaj aktivecoj. Do senelira cirklo? Tia situacio ne favorigas la enkondukon de Esperanto en la lernejojn aŭ universitatojn, tenas la interesiĝon de la amasmedioj je relative malalta nivelo, ne faciligas la aliron al ministerioj kaj aliaj ŝtataj organoj. Sed — la impulsoj por trarompi la cirklon devas veni el la intelektulaj rondoj de la landaj asocioj:

Sekvos kelkaj organizaj paŝoj, kiuj funkciis almenaŭ en GDR. En aliaj landoj, laŭ aliaj kondiĉoj, ekzemple en Hungario aŭ en Soveta Unio, necesis aliaj paŝoj, aŭ nur parte similaj. La paŝoj parte okazas paralele parte sekvas unu la alian.

4.1. Se en difinita lando nenio ekzistas pri interlingvistiko/esperantologio, kaj oni devus komenci ĉe nulo, estus konsilinde unue starigi arkivon kun la bazaj materialoj (riceveblaj plej parte ĉe UEA), por ke oni povu montri fakverkojn al eble interesigeblaj lingvistoj aŭ helpi al trovotaj junaj studentoj enprofundiĝi en la temaron.

En GDR, feliĉe, ekzistas jenaj grandaj kolektoj: ŝtata biblioteko en Berlin kun ĉirkaŭ 3 000 titoloj, arkiva

biblioteko de GDREA kun ĉ. 2 000, privata kolekto de la aŭtoro kun eble 4 000 titoloj (kaj multege da alia materialo) kaj eble pluaj 1 000 titoloj en kelkaj universitataj kaj regionaj centraj bibliotekoj (ekz. Sächsische Landesbücherei Dresden, Deutsche Bücherei Leipzig). Tiuj materialoj estas por seriozaj sciencaj studentoj principe alireblaj. Tre grava estas la kompilado de Centra Katalogo, kiu listigu tion, kio ekzistas en similspecaj publikaj bibliotekoj. Tio ofte estas pli multe ol supozite.

La landa asocio (LA) povus helpi per bibliografiaj informoj pri nove aperintaj titoloj, kiuj estas publikigeblaj en la organo de la LA.

4.2. Se al LA tute mankas sperto, kiel procedi, ĝi povus inviti specialiston pri interlingvistiko el la eksterlando por mem informigi pri la problemoj kaj/aŭ organizi prelegojn en universitatoj. Tiel eble iuj sciencistoj interesiĝus pri la problemoj kaj povus fariĝi valoraj stimulantoj kaj subtenantoj realige al la sekvaj paŝoj.

4.3. Kvankam okazas, ke reputaciaj sciencistoj pretas helpi al la enlanda starigo de interlingvistikaj aktivecoj — pro jam longe ekzistanta simpatio aŭ vekita interesiĝo — oni ne atendu de ili multajn konkretajn kontribuojn. Ilia faka profilo ĝenerale jam estas fiksita. Tamen, ili povus helpi, ke **junaj** studentoj aŭ doktoriĝemaj sciencistoj interesiĝu pri la problemaro. Ili povus starigi utilajn kontaktojn al la redakcioj de fakaj ĵurnaloj, disdoni temojn por diplomlaboraĵoj, por magistrigaj aŭ doktorigaj disertacioj. Kaj ili povus ekspertizi tiujn disertaciojn. En GDR multe helpis ekde 1970 la slavisto Viktor Falkenhahn kaj ekde 1978 la multflanka lingvisto Georg Friedrich Meier, kiu redaktis la gvidan lingvistikan revuon en GDR. Hodiaŭ tre subtenas la konata slavisto Ronald Lötzsch.

4.4. Necesas, do, trovi edukeblan, specialistigeblan junul(in)on, kiu fariĝu paŝon post paŝo specialisto, kapabla kontakti la profesian lingvistikan mondon.

4.5. Paralele al tio estas konvene, formi iun sciencan kolektivon. En 1970 en GDR fondiĝis la fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio en Kulturligo, kiun gvidis prof. d-ro Viktor Falkenhahn de Humboldt-Universitato. La fakgrupo ekzistas ĝis hodiaŭ, sed ŝanĝis sian agadprofilon. Hodiaŭ ĝin gvidas d-ro Lötzsch. Dum la unuaj jaroj tiu kolektivo povas servi al la kleriĝo kaj scienca trejniĝo de siaj membroj (lingvistoj, pedagogoj, historiistoj k.a., ĉiuj fakte esperantistoj). Iom post iom la fakgrupo estas tiom matura, ke ĝi povas prezenti prelegojn antaŭ interesitaj rondoj, organizi seminariojn tiel altirante simpatiantajn sciencistojn ekster la Esperanto-movado.

4.6. Necesas, plue, publikigi studojn pri interlingvistikaj/esperantologiaj temoj en nacilingvaj fakaj ĵurnaloj (lingvistiko). La kontaktoj akirintaj sub 4.3./4.5. helpos. La studoj ne estu periferitemaj kaj ne tro specifaj. Ili estu superrigardaj, kun riĉaj literaturindikoj. La studojn verkas la nove edukitaj specialistoj aŭ la simpatiantaj profesiaj lingvistoj. Ili estas tre gravaj, ĉar informos pri nova scienca branĉo kaj konatigas la fakliteraturon jam sufiĉe riĉan, sed ja ĝenerale nekonatan.

En GDR aperis inter 1949 — 1987 entute 78 germanlingvaj interlingvistikaj/esperantologiaj materialoj de 33 diversaj aŭtoroj. Tio estas 40 studoj, 17 recenzoj, 12 konferencraportoj, 2 diplomlaboraĵoj, 2 doktorigaj disertacioj, 5 monografioj. Inter 1949 — 1969 tamen tio nur estis 6 materialoj de 6 aŭtoroj. 92,3 % de la tuta materialo aperis inter 1970 — 1987, t. e. 72 materialoj de 30 aŭtoroj, aparte multe en „Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationswissenschaft" (Revuo por fonetiko, lingvistiko kaj komunikado-scienco), eldonata de la Akademio de Sciencoj. (Al tio aldoniĝas la sciencnivelaj esperantlingvaj materialoj.)[6])

4.7. Tre gravas, certigi la enigon de la informoj pri aperintaj materialoj en la nacilingvajn bibliografiajn servojn, en leksikonojn kaj manlibrojn.

Tiujn materialojn unue rigardas la nove interesitoj.
En GDR ĉiujare aperas germanlingva lingvistika bibliografia servo[7]). Ĝin eldonas la dokumentadejo de la Centra Lingvistika Instituto de la Akademio. En la kajeroj ĉiujare aperas sub la rubriko „Planlingvoj" pli ol 30 bibliografiaj indikoj pri artikoloj, studoj, monografioj aperintaj en GDR (de GDR-aj aŭ alilandaj interlingvistikoj) kaj de GDR-interlingvistoj en alilandaj revuoj. Tio inkludas esperantlingvajn materialojn (kun tradukita germana titolo). Do — lingvisto, kiu volas orientiĝi, trovas abundan materialon.
Kaj, se li estas prudenta, li unue iom konatiĝos kun la fakliteraturo anstataŭ verki facilanime ion neseriozan.

4.8. Se la fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio jam akiris certan reputacion kaj disponas pri kelkaj prelegokapablaj fakuloj, ĝi povas organizi seminarion aŭ kolokvon. La kolokvo unue havu superrigardan karakteron pri la ĉefaj problemoj de interlingvistiko/esperantologio. Oni invitu konatajn fakulojn de la lando kaj petu ankaŭ iliajn prelegojn. Certe troviĝos interesitoj. Utile estus trovi kuninvitanton, ekz. profesoron de la universitato aŭ de la Akademio. Taktike ne estus bone, se la Esperanto-Asocio mem invitus al la kolokvo. Tio eble ŝajnas al ne nur kelkaj scienc-istoj neserioza entrepreno. Do, la fakgrupo (aŭ Societo aŭ io simila), estu almenaŭ formale sendependa de la landa asocio. Tamen, dependas de la konkretaj cirkonstancoj. En 1987 okazis en Tatranská Lomnica (ČSSR, Slovakio) interlingvistika seminario, kiun organizis Slovaka Esperanto-Asocio kune kun la Ĉeĥa. Ĝi fariĝis sukcesa, ĉar la organizintoj kapablis allogi jam en la prepara fazo konatajn lingvistojn. Ili antaŭe dissendis la presitajn tezojn pri la prelegoj de la varbitaj prelegontoj al interesigeblaj institucioj. Krome ili invitis kelkajn eksterlandajn interlingvistojn kiel prelegantojn. La seminario fariĝis tre sukcesa, sendube starta punkto por la evoluado de interlingvistiko, aparte en Slovakio[8]).

En GDR ekde 1979 ĉiujare (kun escepto de 1987) okazas interlingvistikaj seminarioj en Ahrenshoop (ripozloko ĉe Balta Maro, norde en GDR). La 9-a okazis en 1988. Partoprenas ĉirkaŭ 30-35 profesiaj lingvistoj kaj 4-6 interlingvistoj. La seminario ne estas alirebla por esperantistoj, por garantii la fakan nivelon kaj atmosferon. Dum la 3 plenaj tagoj oni aŭskultas 14 — 18 prelegojn, la duonon de la neinterlingvistoj. Okazas ofte larĝa diskuto pri principaj lingvistikaj demandoj, al kiu la interlingvistoj aldonas sian vidpunkton. Ĉiufoje la partoprenantoj havas la eblecon rigardi ĉ. 150 titolojn de faka literaturo. Tiujn ĝis nun 9 seminariojn partoprenis ĉ. 150 diversaj profesiaj lingvistoj de 22 universitatoj kaj altlernejoj, 3 akademioj kaj de unu eldonejo.[9]) La seminarioj jam fariĝis certagrade institucio. Ili helpis malkonstrui antaŭjuĝojn, interesigi la lingvistojn klarigi interlingvistojn pri ĝeneralaj kaj specifaj lingvistikaj problemoj. La partoprenintaj lingvistoj fariĝis pretaj por helpi al la disvastigo de interlingvistikaj aktivecoj, mem publikigis studojn aŭ raportojn pri la seminario, prelegis antaŭ kolegoj kaj studentoj, invitis la interlingvistojn prelegi k.s. Nun ne estas malfacile trovi ekspertizantoin por doktorigaj disertacioj aŭ por publikigotaj libroj aŭ studoj. Similaj nacilingvaj simpozioj kun la kadra temo „Problemoj de la Internacia Lingva Komunikado" okazas en Lodz (Pollando) sub gvido de T. Ejsmont.[10])

4.9. Se la landa asocio okazigas altnivelan internacian seminarion (ekz. pri problemoj de la faka apliko de Esperanto aŭ medicina konferenco aŭ simile) oni invitu lingvistojn al difinitaj aranĝoj, por ke ili spertu la funkciadon de la lingvo. Tio ofte pli impresas ol kelkaj prelegoj. Cetere, ne estas klare, kial ne regule okazu interlingvistikaj kolokvoj por naciaj lingvistoj, lige al la okazantaj Universalaj Kongresoj. Sed, tia kolokvo devas esti tre zorge preparata.

5. Certaj sekvoj de la supre realigitaj paŝoj povas esti diversaj:

5.1. La fakgrupo aŭ difinitaj specialistoj estas akceptitaj kiel fakaj partneroj. Se temas pri ekspertizoj, peto je kunlaboro por nacia enciklopedio aŭ aliaj manlibroj, oni sin turnos al tiaj specialistoj.

Se necesas reagoj al neĝustaj prezentoj en fakaj materialoj, la fakgrupo kun siaj specialistoj havas la ŝancon esti aŭskulta.

5.2. Se okazos internaciaj lingvistikaj kongresoj en la lando, ne estas malfacile prezenti kontribuojn. Tio pruviĝis 1987 en GDR, kiam okazis la 14-a Internacia Kongreso de lingvistoj[11]) kaj dum majo 1988 kiam en Berlin estis internacia tradukologia konferenco.

5.3. La ministerioj per altlernejoj aŭ scienco (dependas de la landoj) aŭ pri klerigado havas fakan kompetentularon, kiu gravas ĉe diversaj decidoj, ekz. se temas pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn aŭ universitatojn. Tio ankaŭ validas por eventuala enigo de la fako interlingvistiko en universitaton.
Unuavice pro la aktivecoj resumitaj sub 4.1. — 4.9. en GDR ekde 1988 komenciĝis la unuaj Esperanto-kursoj en altlernejoj kaj instaliĝis docenteco pri interlingvistiko en Humboldt-Universitato.
Tamen, kiel jam menciite supre, la instalo de Esperanto-lektoratoj, ekz. en Pollando kaj Bulgario tute ne bezonis la ĉitie menciitajn paŝojn. La landaj kondiĉoj estis aliaj ol en GDR, kie ne eblis fari ion ĉi-rilatan sen la menciitaj paŝoj.

6. Kie estas la loko de UEA ĉe la disvastigo de interlingvistikaj/esperantologiaj aktivecoj sur landa nivelo?

a) Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, (institucio de UEA), povus kaj devus doni sisteman helpon al la asocioj, ekz. patronante diversajn aranĝojn, helpante per konsiloj kaj materialoj. Tre grava estas pli bone organizenda kontakto inter la simile agantaj. Bonan servon donas „Informilo por Interlingvistoj", kiun CED eldonas helpe de la Akademia Interlingvistika Centro en Varsovio.

b) La riĉa libroservo de UEA, la kopiejo, la biblioteko Hodler kaj diversaj eldonajoj kiel la serio de la „Esperanto-dokumentoj" estas grava materialbazo.
Estus bone, se en la revuo Esperanto aperus pli da informoj pri novaj nacilingvaj kaj esperantaj fakmaterialoj, ĉar IPI ne aperos tiom ofte. Nepre UEA akcelu kaj subtenu la publikigon de manlibroj kaj superrigardaj materialoj (Enciklopedio de Esperanto, katalogoj, bibliografioj).

c) La esperantologiaj konferencoj kaj aliaj aranĝoj dum la Universalaj Kongresoj i.a. devus fariĝi spertinterŝanĝejo ankaŭ pri la ĉi-artikola problemaro. Pro tio dum la 73-a UK en Rotterdam aperis la propono, ke la 12-a Esperantologia Konferenco 1989 en Brighton havu la kadran temon „Studoj kaj esploroj pri Esperanto — metodologiaj kaj organizaj aspektoj".

d) Necesas utiligi la kongresojn laŭ 4.9.

e) Tre grave estas, ke oni certigu administran bazon en la Centra Oficejo de UEA. Ekzistas aro de taskoj, kiuj ĉiuj estas ligitaj al sciencaj aŭ fakaplikaj medioj kaj de granda strategia signifo. Ne plu eblas, almenaŭ sur internacia nivelo, administri ĉion ĉi-rilatan per honoroficaj fortoj. Mi celas i. a. la agadkampojn de CED, la tutan terenon de la scienc-teknika kaj alifaka apliko de Esperanto, redaktadon de fakmaterialoj, la evoluantan laboron de la Terminologia Esperanto-Centro kaj ankaŭ la necesan administran subtenon de la Akademio de Esperanto. Ĉio ĉi estas pli ol sufiĉa por multflanka kaj erudicia „scienca oficisto" en la Centra Oficejo.
Kaj fine mi volas reatentigi pri la ideo de „Internacia Konsilantaro: Esperanto — lingvo kaj movado"[12]), kiu havus realan taskon internaciskale kunordigadi, organizi spertinterŝanĝojn, ellabori rekomendojn kaj alimaniere stimuli ankaŭ la interlingvi-

stikan, esperantologian agadon, kiu estus de granda valoro por similspecaj aktivecoj sur la landa nivelo. La scienco fariĝis produktiva forto. Ni uzu ĝin.

7. Notoj

1) Pri la faktoroj influantaj aparte la Esperanto-movadon en kelkaj socialismaj **landoj kp:**
D. Blanke: Pri specifajoj de la Esperanto-movado en kelkaj eŭropaj socialismaj landoj: En: der esperantist, 22 (1986), n-ro 140 (6), p. 121 — 125.

2) Ekz. H. Tonkin: Language problems in internatíonal relations. A select bibliography. En: International Language Review, Denver, N-roj 44 — 49 (1965 — 1967). Vidu krome la literaturindikojn ĉe D. Blanke: Internationale Plansprachen. Berlin 1985, p. 304 — 317.

3) Kp. la ampleksajn literaturindikojn ĉe D. Blanke, citita loko 1985, p. 337 — 367.

4) D. Blanke: Plansprache und Nationalsprache. Einige Probleme der Wortbildung des Esperanto und des Deutschen in konfrontatíver Darstellung. Linguistische Studien, Reihe A, Arbeitsberichte, Nr. 85, Berlin: Akademie der Wissenschaften

5) D. Blanke, citita sub 2)

6) Kp. la bibliografion en „Informilo por Interlingvistoj", Varsovio: Akademía Centro Interlingvistika, kajero 10 (aprilo 1986), p. 1 — 6

7) Sprachwissenschaftliche Informationen. N-ro 11/I+II nomiĝas: Bibliographie zur Sprachwissenschaft der DDR für das Jahr 1986. Berlin Akademie der Wissenschaften, 1987, 300 p. En ĉitiuj volumoj estas 53 indikoj pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj, ankaŭ en Esperanto.

8) St. Košecký (Red.): Problémy interlingvistiky, Zbornik materiálov z interlingvístického seminára (Vysoké Tatry 20 — 22 mája 1987). Bratislava: Jazykovedný ústav Ľ'Štůra SAV. Slovenský esperantský zvaz, český-esperantský svaz 1987. 179 p.

9) Kp. la superrigardon pri la seminarioj en „Informilo por Interlingvistoj", kajero 6 (junio 1985), p. 1 — 10.

10) Jam aperis 6 volumoj, Jen la 6-a: T. Ejsmont (Red.): Miedzynarodowa komunikacja jezykowa. Materiały konferencyjne — Vi. Łodz: Uniw. Łodzki. Studentckié koło Naukowe Esperantystów, 1986, 239 p.

11) Kp. en „Esperanto" 11/1987, p. 194

12) Kp. D. Blanke: Atingoj kaj problemoj de la 100-jara Esperanto. En: Esperanto, 12/1987, p. 209 — 210.

Sabine Fiedler

100 FALSCHE FREUNDE Esperanto – Deutsch

Vorbemerkungen:

1. Unter „falschen Freunden" werden im folgenden Wörter des Esperanto verstanden, die im Deutschen gleiche oder ähnliche Schreibung oder Lautung besitzen, deren Bedeutungen aber teilweise oder völlig von denen der Esperanto-Wörter abweichen.

2. Nicht berücksichtigt werden

   a) Esperanto-Wörter, bei denen nur eine Bedeutung des polysemen deutschen Wortes einen „falschen Freund" darstellt, z. B.

kosti	(esti akirebla je difinita prezo)	— kosten (1) (Geld kosten)
kosti	(falscher Freund)	— kosten (2) (Suppe kosten)
ŝajni	(aspekti simile al io/esti opiniata)	— scheinen (1) (es scheint mir)
ŝajni	(falscher Freund)	— scheinen (2) (die Sonne scheint)

   b) Esperanto-Wörter, die dem Lernenden aufgrund seiner Kenntnisse zu anderen Fremdsprachen als „falsche Freunde" erscheinen, z. B.

raboti	— rabotat' (russ.: arbeiten)
demandi	— to demand (engl.: fordern) demander (franz.: bitten) demandar (span.: bitten)

3. Die halbfett gedruckten Wörter werden im Laufe des Esperanto-Kurses nach dem Lehrbuch von Dahlenburg/Liebig behandelt.

Esperanto	Deutsch	Deutsch	Esperanto
absolvi	lossprechen freisprechen	absolvieren (ein Studium)	fini studadon/ finstudi
afero	Angelegenheit Sache	(Liebes-) Affäre	amafero
alo	Flügel Seitenteil	All	universo
alta	hoch	alt	(Pers.) maljuna (Geg.) malnova
angora	angstvoll	Angora (-katze)	angura (kato)
arto	Kunst	Art	speco (Biol.) specio
ajn kiu ajn iu ajn	Partikel-, Interrogativ- u. Indefinitivpron. folgt wer auch immer irgendein	ein	unu (Num.) unbest. Art. (im Esperanto nicht übersetzt)
bani	baden	bannen (eine Gefahr)	forigi (danĝeron)
blanka	weiß	blank	(rein) brila (bloß) nuda (poliert) polurita
bordo	Ufer	Bord	(Wandbrett) breto (an Bord sein) esti sur ŝipo
boto	Stiefel	Boot	boato
bulo	Kugel, Klumpen Kloß/Knödel	Bulle	virbovo (Stier) taŭro
buŝo	Mund	Busch	arbusto
cent	hundert	zehn Zehnt	dek dekonaĵo
ĉelo	Zelle	Cello	violonĉelo
disko	Scheibe	Disko	diskludejo/ diskoteko
domo	Haus	Dom	katedralo
du	zwei	du	(Pers.-pron.) vi
dum	während	dumm	stulta
duro	span./port. Silbergeldstück	Dur	maĵora
erbino	Erbiumoxid	Erbin	heredantino
fabelo	Märchen	Fabel	fablo (Sujet) temo
fari	machen, tun	fahren	veturi
festa	festlich	fest	firma
fibro	Faser	Fieber	febro
fidela	treu, zuverlässig	fidel	gaja
flati	schmeicheln	flattern	flirti
frago	Erdbeere	Frage	demando
graso	Fett	Gras	herbo
grifo	Greif (Fabeltier) Greif (-vogel)	Griff	preno, kapto (zum Halten) tenilo, prenilo
homo	Mensch	Homo (sexueller)	homoseksualulo, samseksemulo

Esperanto	Deutsch	Deutsch	Esperanto
ĵaluzo	Eifersucht	Jalousie	ĵaluzio
kanino	Eckzahn	Kaninchen	kuniklo
kanto	Lied	Kante	eĝo, rando
kapo	Kopf	Kappe	ĉapo
kelo	Keller	Kelle	(Schöpf-) kulerego, ĉerpilo
			(Maurer-) trulo
kisto	Zyste	Kiste	kest(eg)o
kojlo	Grimmdarm	Keule	klabo
koncepto	Konzeption, Auffassung, schöpferischer Gedanke	Konzept (Entwurf)	malneto
korno	Horn, Hupe	Korn	grajno (Getreide)
			greno
koro	Herz	Chor	koruso (Arch.) ĥorejo
kulero	Löffel	Kuller	globeto
kulo	Mücke	Kuhle	fosaĵo
			tertruo
kuri	laufen	kurieren	kuraci
			sanigi
kuseno	Kissen	Cousin	kuzo
kuŝi	liegen	kuschen	obei
		kuscheln	sin karese alpremeti
lago	See	Lage	situacio
			(Geogr.) situo
lado	Blech	Lade	(tir)kesto
lakso	Durchfall	Lachs	salmo
laŭ	gemäß, nach	lau	varmeta duonvarma
legi	lesen	legen	meti, kuŝigi
ligi	(ver)binden	liegen	kuŝi
limo	Grenze	Limo	limonado
lobo	Flügel, Lappen (Anat.)	Lob	laŭdo
maĉo	Wettkampf	Matsch	ŝlimo
magazeno	Geschäft, Einkaufsstätte	Magazin (Journal)	magazino
mamo	Brust, Euter	Mama	patrino, panjo
mano	Hand	Mann	viro
mondo	Welt	Mond	luno
morti	sterben	morden	murdi, mortigi
muso	Maus	Mus	kaĉo, pureo
muta	stumm	mutig	kuraĝa, sentima
nostalgio	Heimweh	Nostalgie	sopiro revidi la patro-landon, hejmveo
oro	Gold	Ohr	orelo
pano	Brot	Panne	paneo
papo	Papst	Pappe	kartono
parolo	Rede	Parole	signalvortoj
			devizo
pasi	(ver)gehen	passen	esti konforme al,
			(Kartenspiel) rezigni
plaŭdi	plätschern rieseln	plaudern	babili
plumo	Feder	Blume	floro
radio	Strahlen-	Radio	radioaparato

Esperanto	Deutsch	Deutsch	Esperanto
rasti	harken	rasten	halti, ripozi
robo	Kleid	Robe	talaro, sutano
roko	Felsen	Rock	jupo
sago	Pfeil	Sage	legendo, mito
		Sago	saguo
salo	Salz	Saal	salono
sino	Schoß	Sinn	(Physiol.) senso (Bedeut.) senco
slipo	Notizzettel	Slip	kalsoneto
soko	Pflugschar	Socke	duonŝtrumpo
sorto	Schicksal	Sorte	speco, tipo (Biol.) vario
spino	Wirbelsäule	Spinne	araneo
stari	stehen	starren	fiksrigardi
stato	Zustand, Rang	Staat	ŝtato
stelo	Stern	Stelle	loko
stiri	lenken, steuern	stieren	fiksrigardi
streki	einen Strich ziehen	strecken	etendi
ŝamo	Chamoisleder	Scham	honto
tanko	Panzer	Tank	benzinujo
termino	Terminus	Termin	limdato
tero	Erde	Teer	gudro
toro	Kreisringfläche (Torus)	Tor	(törichter Mensch) malsaĝulo (große Tür) pordego, portalo (Sport) golo, golejo
tribo	Stamm	Trieb	(Sprößling) ŝoso (Physiol.) instinkto, impulso
trito	Molch	Tritt	(Fuß-) piedpaŝo piedbato (Podest) podio
truto	Forelle	Truthahn	meleagro
turni	drehen, wenden	turnen	gimnastiki
vagi	umherschweifen	wagen	riski
velo	Segel	Welle	ondo
vendi	verkaufen	wenden	turni
virto	Tugend	Wirt	mastro, gastejestro

Baza legolisto de la originala Esperanto-literaturo

En la libro de William Auld „La fenomeno Esperanto (kp. la recenzon de Till Dahlenburg en „de" 5/88) aperis listo de Esperantaj originale verkitaj libroj. Ĝi estis represita en „Hungara Vivo" 3/88. Pri tiu listo d-ro Vilmos Benczik, unu el la plej gravaj literatur-teoriistoj de Esperanto, komentis jene: „La listo konsistas el 51 titoloj: 22 poemlibroj kaj 29 prozaj verkoj, kreitaj dum sepdek unu jaroj, inter 1912 kaj 1983. Kronologie la unua estas la poemaro Tra l' silento de Edmond Privat, la lasta la romano Sur kampo granita de István Nemere. Verŝajne estas pli ol hazardo, ke el la 51 libroj 11 venas el la plumo de hungaraj aŭtoroj.

Sed mi ne celas nun fari hungaran propagandon. Min pensigas tiu listo, pri kies iu aŭ tiu ero oni povus eble diskuti, sed tio ne havus sencon. La

listo de Auld estas zorge pripensita, elektita surbaze de lia admirinda kono de nia beletro. Ni devas cerbumi pri tio, kiel utiligi ĝin!

Oni ofte konstatis, ke en la disvastigado de la Esperanta kulturo la ĉefa malhelpo estas tio, ke Esperantujo ne havas kulturan substrukturon, t. e. lernejan reton, kiel la naciaj kulturoj. Pro tio la kulturaj-literaturaj konoj de la esperantistoj estas tre hazardaj, mankas al ili komuna bazo. Nun ni havas la bazon, produkton de la ĉefa korifeo de nia literaturo. Ni uzu ĝin.

Kiel? Unue, tiu ĉi listo devas esti diskonigita ĉie. Mi petas ĉiun kolegon-redaktoron represi ĝin. Ĝi atingu senescepte ĉiun esperantiston, kiu scias legi. Se plurfoje, do tiom pli bone. Due, iamaniere ĝi eniru niajn ekzamenajn postulojn. Kompreneble oni ne devas preskribi por la ekzamenigantoj en mezgrada ekzameno legi ĉiujn 51 librojn. Sed jes, oni povas devigi ilin elekti la kutime legendajn tri, kvin aŭ ses librojn ĝuste el tiu ĉi listo!

Oni povas objeti, ke preskaŭ duono de la listo momente ne troviĝas en la merkato. Tio estas vero. Kaj eĉ pli, multaj el la aĉeteblaj titoloj estas riceveblaj nur kontraŭ internacie ŝanĝebla valuto. Tamen, la demando estas alirebla ankaŭ alimaniere. Nome, pli ol duono de la listigitaj libroj aĉeteblas, kaj kelkaj el ili aĉeteblas ankaŭ en la valut-malriĉa Orienta Eŭropo ...

Sed sendube estas farendaĵoj ĉi-kampe. La Eldonejo de Hungara Esperanto-Asocio promesas koncentri siajn eldonrimedojn por ŝtopi la truojn en tiu ĉi listo. La libroj, kiuj laŭ niaj planoj eliros ĝis la venontjara UK, estos verŝajne la sekvaj: Pilgrimo, Preter la vivo, Sur sanga tero kaj Viktimoj de Baghy, Koko krias jam! kaj La granda aventuro de Szilágyi, sed eble ankaŭ aliaj, provizitaj per praktika studcela postparolo — kaj represo de la tuta listo en ĉiu volumo. Ni eklaboru ĉiuj: redaktoroj de internaciaj revuoj kaj lokaj bultenoj, membroj de ekzamenaj Komisionoj, eldonistoj, libroservoj kaj eĉ kunmetantoj de klubaj programoj. Por la Esperanta kulturo. Por la unueca kultura bazo de ĉiuj esperantistoj."

Do, nia redakcio realigas la alvokon de d-ro Benczik:

Poezio

— **Auld, William (red.):** Esperanta antologio. Dua eldono, reviziita kaj kompletigita. Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1984. 887 p.
— **Auld, W.; Dinwoodie, J. S.; Francis, J. I. k; Rossetti, R.:** Kvaropo. J. Régulo, La Laguna, 1952, 267 p.
— **Auld, William:** La infana raso. J. Régulo, La Laguna, 1956. 104 p.
— **Baghy, Julio:** Pilgrimo. Budapest, 1926. 124 p.
— **Baghy, Julio:** Preter la vivo. Literatura Mondo, Budapest, 1923. 124 p.
— **Boulton, Marjorie:** Eroj. J. Régulo, La Laguna, 1955. 286 p.
— **Hohlov, N.:** La tajdo. Heroldo de Esperanto, 1928. 61 p.
— **Kalocsay, Kálmán:** Streĉita kordo. Literatura Mondo, Budapest, 1931. 189 p.
— **Kock, Edwin de:** Fajro sur mia lango. J. Régulo, La Laguna, 1967. 119 p.
— **Kurzens, Nikolai:** Mia spektro. Literatura Mondo, Budapest, 1938. 64 p.
— **Maúra, G. E.:** Duonvoĉe. J. Régulo, La Laguna, 2a eld., 1963. 179 p.
— **Miĥalski, Eŭgeno:** Prologo. SAT, Leipzig, 1929. 62 p.
— **Miyamoto Masao:** Invit' al japanesko. J. Régulo, La Laguna, 1971. 110 p.
— **Peneter, Peter:** Sekretaj sonetoj. Konfidencie (Budapest? 1931?). 95 p.
— **Privat, Edmond:** Tra l' silento. Ĝenevo, 1912, 29 p.
— **Ragnarsson, Baldur,** Ŝtupoj sen nomo. J. Régulo, La Laguna, 1959. 127 p.
— **Rossetti, Reto:** Pinta krajono. J. Régulo, La Laguna, 1959. 128 p.
— **Sadler, Victor:** Memkritiko. Eldonejo Koko, Kopenhago, 1967. 60 p.
— **Schwartz, Raymond:** La stranga butiko. Esperantista Centra Librejo, Parizo, 1931. 127 p.

— **Schwartz, Raymond:** Verdkata testamento. Centra Librejo Esperanta, Parizo, 1926. 123 p.

— **Tárkony, Lajos:** Soifo. J. Régulo, La Laguna, 1964. 231 p.

— **Ueyama Masao:** Por forviŝi la memoron pri ŝi. L' Omnibuso, Kioto, 1974, 95 p.

Baza Legolisto de la Originala Esperanta Literatura Proza Fikcio

— **Baghy, Julio:** Sur sanga tero. 2a eld. Szalay, Budapest, 1933. 254 p.

— **Baghy, Julio:** Viktimoj. Hungara Esperanto-Instituto, Budapest, 1925. 162 p.

— **Boulton, Marjorie:** Okuloj. J. Régulo, La Laguna, 1967. 177 p.

— **Bulthuis, H. J.:** Ideoj de orfeo Den Haag, 1923. 542 p.

— **Engholm, Stellan:** Homoj sur la tero. Literatura Mondo, Budapest, 1932, 201 p.

— **Forge, Jean:** Mr. Tot aĉetas mil okulojn. Literatura Mondo, Budapest, 1934. 243 p.

— **Francis, John:** La granda kaldrono. TK/Stafeto, Antverpeno, 1978. 592 p.

— **Francis, John:** Vitralo. J. Régulo, La Laguna, 1960. 135 p.

— **Konisi Gaku:** Vage tra la dimensioj, Japana Esperanto-Ligo, 1976. 77 p.

— **Lorjak:** Regulus. Eldono Gabrielli, Ascoli Piceno, 1981. 340 p.

— **Luyken, H. A.:** Pro Iŝtar. Hirt & Sohn, Leipzig, 1924. 304 p.

— **Miyamoto Masao:** Naskitaj sur la ruino — Okinavo. Librejo Pirato, 1976, 146 p.

— **Nemere, István:** Sur kampo granita. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1983. 125 p.

— **Newell, L. N.:** Bakŝis. Literatura Mondo, Budapest, 1938. 149 p.

— **Piĉ, Karolo:** La litomiŝla tombejo. Artur E. Iltis, Saaarbrücken, 1981. 276 p.

— **Ribillard, Jean:** Vivo kaj opinioj de majstro M' aSud. J. Régulo, La Laguna 1963. 143 p.

— **Robinson, Kenelm:** Se grenereto ... Londono, 1930. 158 p.

— **Rosbach, Johan Hammond:** Fianĉo de l' sorto. Dansk Esperanto-Forlag, 1977. 192 p.

— **Rossetti, Cezaro:** Kredu min, sinjorino! Heroldo de Esperanto, Scheveningen, 1950. 259 p.

— **Rossetti, Reto:** El la maniko. J. Régulo, La Laguna, 1955. 221 p.

— **Rossetti, R.; Szilágyi, F.:** 33 rakontoj: La Esperanta novelarto. J. Régulo, La Laguna, 1964. 328 p.

— **Schwartz, Raymond:** Kiel akvo de l' rivero. J. Régulo, La Laguna, 1963. 487 p.

— **Schwartz, Raymond:** Vole ... novele. TK, Kopenhago, 1971. 192 p.

— **Sturmer, K. R. C.:** Por recenzo! The Esperanto Publishing Co, Londono, 1930. 61 p.

— **Szathmári, Sándor:** Vojaĝo al Kazohinio. SAT, Parizo, 1958. 315 p.

— **Szilágyi, Ferenc:** La granda aventuro. Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1945. 143 p.

— **Tóth, Endre:** Lappar, la Antikristo. Hungara, Esperanto- Asocio, Budapest, 1982. 137 p.

— **Varankin, Vladimir:** Metropoliteno. Ekrelo, Amsterdam, 1933. 200 p.

Valora kontribuo pri LEA

En „Beiträge zur Geschichte der Arbeiterbewegung" (Kontribuoj pri la Historio de la laborista movado), eldonita de la Instituto pri Marksismo-Leninismo ĉe CK de SED, aperis en n-ro 6/88 valora artikolo de Felix Humberg „Laboristaj Esperantistoj en Turingio" sur la paĝoj 813—821. La aŭtoro donas bonan superrigardon pri la turingia movado de LEA, grandparte ligita i. a. al la nomo Paul Göpel. Konsultito por la artikolo estis Werner Habicht el Waltershausen.

Letero de Canko Murgin al la redaktoro de „der esperantist"

„... En la freŝa n-ro 3 (149), de la kuranta jaro mi estis feliĉa tralegi vian recenzon (p. 63) pri mia verko „Progresemaj Momentoj en la Ideologio de D-ro L.-L. Zamenhof." Mi kore dankas pro la pozitiva rilato via al la unua eseo „L.-L. Zamenhof pri la Internacilingva Ideo". Tutcerte pri tiu temo verkis multegaj aŭtoroj, sed precipe de fakuloj en lingvistiko kaj eble ili konscie iom neglektis diri pli multon pri socia rolo de planlingvo, kiu ekfunkciis perfekte kaj ne multon, cedante al la lingvoj naciaj kaj etnaj. Tiu mia verko, bedaŭrinde, havas mankon. Kune kun tiu temo mi devis diri mian opinion: „Kial nur Esperanto fariĝis el projekto al parolata lingvo." Certe tiu manko de mia verko ne estas fatala, ĉar aliaj kompetentaj aŭtoroj jam verkis pri tiu kialo, sed dum la verkado de mia nova serio de eseoj sub komuna titolo „Pri la Naturo de Zamenhofa Mondkoncepto en periodo ..." (1876 — 1879, 1879 — 1885 ktp.) mi trafis tre interesajn faktojn, kiuj ege pensigis min kaj ili estis por mi io tre nova, utiligota.

Vi rilatis ege pozitiva ankaŭ pri mia eseo „D-ro L.-L. Zamenhof pri la Interna ideo de Esperant(ism)o". Pri la ideaj motivoj en Esperanto-movado mi ekinteresiĝis de 1937, kiam mi fariĝis esperantisto. Tiam estis la 50-jara Jubileo de Esperanto. Ĉiuokaze verkante pri la menciita temo (interna ideo) ekde 1979 via verko pri tiu temo estis ĵus aperinta kaj jam tiam kaj nun mi legis kaj legas ĝin ĉiam kun renovigita intereso. Ĉar via verko estis jam preta kaj disponigita al la monda legantaro, tial mi donis al mia samtema verko aspekton el alia vidangulo t.e. mi traktis ĝin el historilogika vidpunkto kaj prezentis ĝin en etapoj de ties disvolviĝo. Tial mia verko pri la Interna Ideo ne ripatas la vian, sed nur enkondukas la leganton por ke, pli profunde, tiu komprenu vian verkon. Do mia teksto pri tiu temo estas kompletigo.

Via ĝenerala kuraĝigo al mi, ke mi klopodis doni novan interpreton pri malnovaj eventoj estas kaj laŭdo kaj riproĉo. Zamenhof kiel tuteca persono estas memstara kosmo. Kiel tia li restos neelĉerpebla fonto por scioj kaj komentoj laŭ la bezonoj de ĉiu epoko. Ernesto Drezen estis la unua (1929), kiu lanĉis la tezon pri aprezo de L.-L. Zamenhof el nova vidangulo, mi nur povis daŭrigi ... Mi nun lasos flanken la ceterajn laŭdojn kaj mi emas diri pri la riproĉoj.

Via riproĉo pri mia verketo „L.-L. Zamenhof sub la Radioj de Marksismo-Leninismo ekde 1904" vekas mian scivolemon. Diri „troigon" tio signifas, ke io vere ekzistas (eĉ se en miniaturo) kaj mi ĝin troigas, tio estas la unua klara pretendo kaj oni povas diskuti sur tiu bazo, sed diri „nete troigi" tio signifas el Nulo oni faras IOn. Sur tiu nivelo mankas ebleco pri utila diskuto, sed oni povus sen utilo disputadi.

La historiistoj ofte en siaj esploroj similas al paleontologoj. El trovita fosilio ekzemple „osto" aŭ nur spuro de „folio" la paleontologo — konanta la leĝojn pri evoluo de flaŭro kaj faŭno kapablas restarigi la tutecon de animalo, kies oston oni trovis aŭ la planton pri kies folio oni havas kelkan skizan informon. Kaj la historiisto ofte devas solvi tiajn problemojn. Oni aperigis la leteron de D-ro Asnes. Absoluta silento pri tiu fosilio, trovita de Adolf Holzhaus. Ĝi ĵetas abundan lumon al periodo trijara (1904 — 1906) en Rusa Imperio (socia bildo sub despotismo) kaj agado de D-ro Asnes, dum tago en sia profesio kaj dum nokto por Esperanto. D-ro Asnes estis proksima kamarado de Zamenhof. Per tio ni ekkonas tute konkrete la cirkonstancojn kaj parton de la homoj en Rusio kun kiu Zamenhof kunlaboris. Krome Zamenhof estis objekto de varbado jam dum lia studado en Moskva Universitato fare de naciistoj kaj socialistoj ... Sur tiu tute konkreta fono de cirkonstancoj

D-ro L.-L. Zamenhof ricevas leteron de bulgara esperantisto kaj revolucia socialdemokrato pri Esperanto kaj socialismo. Kaj tiu letero ne estas ordinara skribaĵo.

Kaj se la letero de D-ro Asnes servis al mi por enkonduko de mia verketo, la letero de Penko Petrov donis la unuajn faktojn pri enhavo ... Do mia verketo „L.-L. Zamenhof sub la Radioj de Marksismo-Leninismo en 1904" ne estas „perpetuum mobile" t.e. IO konstruita el NENIO. Ne el NULO, sed el sufiĉe da faktoj mi konstruis mian tezon. Jen estas la konkludo mem de tiu mia verketo: „Ĉe Zamenhof aperis TUTE NOVAJ **PENSOJ** pri batalo kontraŭ imperiismo kaj militarismo Por STARIGO de paco kaj socialismo. Ĉu li sukcesos JUNGI Tiujn Novajn Ideojn en SERVO de siaj klopodoj por PERFEKTIGI la mondon aŭ LI REVENOS al la pacifisma kamero obskura?"

D-ro L.-L. Zamenhof ne revenis en sian kameron obskuran, sed aliris sur vastan kampon de sociaj bataloj, li starigis mobilizantan sloganon: „Ni inter popoloj la murojn detruos ..." (1905).

Ĉu TIO estas Nulo, estas NENIO?

La traktado de tiu mia temo havas certan signifon por pli bona kompreno de Zamenhofaj mondkoncepto ĝenerale kaj poezio aparte.

Por ke mia respondo estu almenaŭ minimume plena mi emas citi ankaŭ la konkludon de la sekva mia eseo (p. 33—35): „Pensiga Momento en la Poezio de D-ro L.-L. Zamenhof":

„Mia konkludo, de Zamenhof adoptis la revolucian metodon en sia verko ‚Preĝo sub la Verda Standardo' ne estas banala sugesto, sed vitala konstato pri Progresema METAMORFOZO, kiu k o m e n c i ĝ i s ĉe li."

Jes, temas pri komenciĝo de metamorfozo ...

Por pli bona orientiĝo mi ŝatus prezenti la konkludojn ankaŭ el ceteraj eseoj (studoj). En la studo „L.-L. Zamenhof pri Perfektigo de la Homaro" (p. 37—47): „Ĉiu esperantisto, ĉiuj esperantistaj organizo, fakmovado, instanco regule faru bilancon pri sia agado kaj dediĉu ĉiam pli kaj pli da atento al la nun brulanta pac-problemo, por ke la pacamikoj povu superi, sufoki kaj elimini la militarismon kaj la egoismon el la vivo de la homoj kaj de la nacioj en la tuta mondo" (p. 47).

En la studo „L.-L. Zamenhof dum la Revoluci-Prepara Periodo (1910 ĝis 1914)" (p. 51—56) mi faris konkludon: „La izolo de Zamenhof disde la internacia Esperanto-movado pro eksplodo de la Unua Mondmilito (1914 ĝis 1918), la implikiĝo de lia malnova kormalsano unue bremsis — kaj fine la morto ĉesigis en aprilo 1917 — tiun pozitivan proceson de lia Ideologia Sereniĝo (p. 56).

Unue mi parolis konklude, ke temas pri komenciĝo de progresema metamorfozo, poste atentigis pri batalo por paco, pri kontraŭstaro al militarismo, pri ekskludo de egoismo t.e. de ekspluatado de homo kontraŭ homo kaj en la fino ni konstatis, ke tiu pozitiva proceso ĉe Zamenhof estis ĉesigita pro lia morto (1917).

Neniam mi asertis, ke Zamenhof estas revolucia socialisto. Penko Petrov estis revolucia socialisto kaj li impulsis al D-ro L.-L. Zamenhof iron al revolucio, al socialismo. Dum la Unua Kongreso de Esperanto Zamenhof diris, ke tie kunvenis kongresi „ne anglo kun franco, ne ruso kun polo, sed homo kun homo. Tio ne estas interna ideo. Ĝi estas internaciismo en tre ĝenerala formo. En konkreta formo Zamenhofa internaciismo estas bonege esprimita en lia salut-letero al laborista Esperanto-organo „La Kulturo", Prago, I, 2, 1912 kaj en letero de 1914, en kiu li rifuzas aliĝi al fondota Hebrea Esperanto-Ligo.

En la eseo „Rompu la Murojn inter la Nacioj kaj Rekonstruu la Homaron!" (p. 57—59) la konkludo ĝeneraligas: „Efektive la vivo en la landoj de reala socialismo konfirmas ĉiam pli kaj pli evidente tiun tendencon en la disvolvo de la homaro, pri kiu Zamenhof Ofte, Libere kaj Senbride

REVIS, sed nur Rare, Alude kaj eĉ enigme (li) povis PAROLI al la publiko" (p. 59).

Certe mia verko „Progresemaj Momentoj en la Ideologio de L.-L. Zamenhof" havas kaj mankojn kaj difektojn, sed oni neniam atingos idealan nivelon de sukceso, ĉar dumtempe la cirkonstancoj ŝanĝiĝas, la rolo de malnovaj faktoroj varias, aperas tute novaj elementoj de cirkonstancaro kaj eĉ tute novaj faktoroj, postuloj ktp. Ekzemple mankas en mia verko la studo pri Homaranismo de D-ro L.-L. Zamenhof. Tiu estas preta, vi legis kaj aprobis ĝin, sed pro ties granda amplekso (43 paĝoj) ĝi ne povis trovi lokon en „Paco" de GDR, la ununura loko, kie ĝi povis esti komprenita kaj redaktita. Respondante al aperintaj recenzoj en la gazetaro kaj al demandoj, starigitaj de legantoj kaj pro plua ĉiutaga daŭra laboro mi venis al konvinko verki alian serion de studoj kaj eseoj por kompletigi la ideologian bildon pri Zamenhofa mondkoncepto. La Eseo I „Pri la Naturo de Zamenhofa Mondkoncepto (1876—1879)" jam aperis en „Bulgara Esperantisto", N-ro 10, Oktobro 1988. Eseo N-ro II: „Pri la Naturo de Zamenhofa Mondkoncepto (1879—1885)", atendas en la redakcio de „Bulgara Esperantisto" kaj devus apri en „BE", kun daŭrigo en N-roj 11 kaj 12, en Novembro kaj Decembro 1988. La Eseo I aperis, sed iom mallongigita kaj sen bibligrafiaj notoj pro manko da sufiĉa loko. En Eseo III aperos daŭrigo pri Zamenhofa internaciismo k.a. la internaciismo nur ŝajne malaperis, sed ĝi daŭre ekzistas sub Nova Nomo.

Al trankvila, senpretenda kaj libera diskuto por defendi Zamenhofon kaj lian testamenton pri Kunekzisto, Kunlaboro kaj Konkordo inter la nacioj, etnoj, ŝtatoj, organizoj, homoj!"

Canko Murgin

(La majuskligon ni ne ŝangis.)

Esperanto sur televida ekrano

Ĉu vespere la 4-an de oktobro 1988 vi vidis la amuzan programon „Sprungbrett" (Trampolino") en la GDR-televida programo?

Dum tiu sendaĵo la anoncisto kaj kantisto Muck salutis esperantlingve la kantiston Peter Wieland. P. Wieland klarigis, ke ĝis nun li sonbendigis 12 kantojn esperantlingvajn. Kelkaj el ili jam estis elsenditaj de radiostacio de GDR. Sed estas interese, ke la kantisto nur fonetike ellaboris la kantojn, Esperanton li ne scipovas.

Alvoko al fotokonkurso

La Esperanto-klubo „Kolombo de Paco" en Drogobiĉ (Ukrainio, SU) organizas internacian fotoekspozicion sub la titolo „Esperanto, Paco, Planedo, Ni" por montri la rolon de la internacia lingvo kiel ilo de interrilatoj kaj amikeco. Sendu kolorajn aŭ nigrablankajn fotojn (libera formato, plej bone 30 x 40 cm, kun nomo de la fotinto, lia adreso kaj titolo de la foto) pri la temoj: Esperanto-movado, pacbatalo, beleco de naturo, ekologio, politiko, kutimoj de popoloj, turismo, sporto, ripozo, humuro ktp. Post inaŭguro en Drogobiĉ la ekspozicio estos montrata en pluraj sovetiaj urboj kaj, laŭ deziro, en aliaj landoj. La partoprenantoj ricevos katalogojn, povos gajni premiojn kaj suvenirojn aŭ eĉ inviton al Sovetunio por partopreni la inaŭguron. Sendu viajn fotojn al: Vasil Stanoviĉ, 293 720 Drogobiĉ, Lvov obl. Ukrainio, P K 20, Sovetunio.

Korespondado

INTERNACIA KORESPONDA SERVO helpos al Vi trovi korespondant(in)on, amik(in)on aŭ partner(in)on. Por pluraj informoj sendu unu internacian respondkuponon al: Box 163 Stn. „A" Downsview, Ont. M3M 3A3 Canada

Turismaj tagoj

„Dekunuaj Turismaj Tagoj en Žilinä okazos ekde 29. 7. 1989 ĝis 4. 8. 1989. Detalojn kaj aliĝilojn petu ĉe Esperanto-klubo Žilina, pk. B152, 010 42, Ĉeĥoslovakio.

Interŝanĝo de grupoj

Jam de 3 jaroj en la lernejo „Ivan Vazov" en Smoljan (Bulgario) grupo de gelernantoj (15—18 jaraj) okupiĝas pri Esperanto. La lernejo proponas interŝanĝon kun eksterlandaj grupoj. Ĝi ofertas 14-tagan tendaron ĉe la Nigra Maro kun la bulgaraj gelernantoj kaj 20-tagan laboron en fojnkolektada brigado kun unusemajna ekskurso en la regiono de Smoljan.
Interesitaj lernejanaj grupoj skribu ĝis fino de marto 1989 al: 4700 Smoljan, Lernejo „Ivan Vazov", Esperanta klubo „Paco", Bulgario.

Letervespero

Okaze de la „Internacia Tago de Mondpaco", la 1-an de septembro 1989, la Esperanto-grupo Dessau aranĝos letervesperon kaj ekspozicion.
Ni atendas salutleterojn, E-ajojn, desegnaĵojn ktp. por demonstri la disvastiĝon de Esperanto. Ĉiu sendanto ricevos respondon.
Ni bezonas ankaŭ vian salutkarton!
Skribu al: s-ro Uwe Heidrich, Augustenstr. 8, DDR—4500 Dessau, GDR

Esperanto-poŝtmarko pli multekosta

La poŝtmarko, kiu aperis en 1987 okaze de la Esperanto-jubileo en GDR, plimultkostiĝas. Kio estis antaŭvidebla, la 85 pfeniga marko nun kostas 1,70 M. GDREA ankoraŭ havas stokon por vendi.

Recenzoj

Popularscience pri la grandiozaj perspektivoj de la komputado:

Luc De Brabandere, Anne Mikolajczak: INFODUKTOJ — nova vorto — nova futuro. BSO/UEA, Rotterdam 1988, 142 paĝoj.

„Ĉi tiu verko, aperinta origine en la franca kaj poste en la nederlanda, estas tradukita al Esperanto laŭ iniciato de la DLT-grupo ĉe BSO/Reseach (esplora fako de BSO). Tiu iniciato havas du celojn: Unue ĝi celas atingi junan generacion de Esperanto-parolantoj, forte interesitaj pri teknologiaj kaj sociaj novaĵoj. ... La dua celo estas ligita al DLT ... Tial la pli perspektiva evoluigo de la DLT-sistemo povos ĉerpi multan utilon el forte kreskanta kaj aktuala sortimento de tradukitaj verkoj. Nur surbaze de tia sortimento eblos kompili la ampleksajn terminarojn kaj semantikajn vortarojn, kiuj estos bezonataj por la konstruo de tia granda perkomputila traduksistemo.

Ke devas aperi en Esperanto pli da tradukoj de modernaj, informaj, sciencaj kaj teknikaj tekstoj — jen deziro, kiu denove esprimiĝas plurfoje lastatempe (en la revuo Esperanto). Tiurilate oni emfazis ankaŭ la bezonon de kleriga materialo en la Tria Mondo.

Unuafoje nun, BSO publikigas tradukon kadre de la DLT-projekto, kaj kunlabore kun UEA. ...

Samtempe, la aperigo de Esperanta traduko de ĉi tiu libro servis kiel eksperimento pri la kosto kaj efikeco de rapida gruplaboro: metodo jam normala en la mondo de la tradukistoj, sed ankoraŭ escepto en la Esperanta merkato, kie multo baziĝas sur volontula laboro."

(Citaĵoj el la „Antaŭparolo al la Esperanta eldono", skribita fare de Victor Sadler kaj Toon Witkam.)

Ĉi tiu libro estas eseo, nova provo rigardi la komputilon el alia vidpunkto, kun la akcento prefere sur la ideoj ol sur la tekniko. Ĝi samtepe ebligas al la laiko kompreni la bazajn principojn de la informadiko, kaj al la fakulo vidi ilin, koncize resumitaj, en nova perspektivo. Finfine, ĝi instigas ambaŭ partiojn surbaze de fakaj scioj diskuti pri tio, kion ni vere volas atingi per la novaj rimedoj.

Saĝe kaj postulante la kunpensadon, la aŭtoroj gvidas la leganton al la mondo de la eksterordinaraj eblecoj elkreskantaj el la „nova kohero" inter diĝitaligitaj informoj, sonoj, bildoj, komputiloj, retoj, satelitoj, robotoj, terminaloj, datumbankoj, telefonoj videotekstoj, ekspertaj sistemoj, — kondiĉe ke ili ĉiuj estas interligitaj per „infoduktoj". Tiun nocion enkondukas la aŭtoroj jene:

„Infodukto, do, estas ĝis nun mankanta nocipriskribo por la informretoj kiuj provizas la kreivan socion per informoj, kiel la akvoduktoj pasintece distribuis la por la agrikulturo nemalhaveblan akvon kaj la petrolduktoj nun donas al la industrio energion." Ne eblas ĉi tie prezenti la vastan gamon de la traktitaj problemoj kaj perspektivoj.

Mi tamen notu, ke la aŭtoroj uzas la samajn komputikajn fakvortojn, kiujn ankaŭ aplikas la majoritato de la esperantistaj komputantoj kaj -istoj; nome ili uzas la terminojn:

informadiko, datumo, komputilo, memoro, fleksodisko, interfaco. Ili enkondukas la terminojn „telemadiko" (kiel supera nocio por „telekomuniko plus informadiko"), kaj „infodinamiko" (kiel analogaĵo al „termodinamiko").

Tamen mi ne komprenas, kial ili bezonas la formon „diĝitala", kvankam pro ĉiuj al mi krome konataj aŭtoroj la formo „diĝita" sufiĉas.

Pri la lastaj paĝoj de la broŝuro mi volonte scius la opinion de sociologoj kaj aliaj sociscienciistoj, ĉar la konkludoj certe estos aliaj sub socialismaj kondiĉoj. Eĉ restas la demando, kiel vaste validas la supozoj de la aŭtoroj pri „vundeblaj retoj", „informmagio", „konstrubrikoj por nova humanismo" kaj kreskanta „kreiveco". Fine mi rekomendas al ĉiuj interesiĝantoj havigi al si tiun interesegan broŝuron per aĉeto aŭ interŝanĝo.

Michael BEHR

Klasikaĵo de sciencfikcio — tamen ege aktuala:

Sándor Szathmári: PERFEKTA CIVITANO, Plena novelaro. Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1988, 456 paĝoj, kun bibliografio, aŭtobiografieto kaj postparolo.

Sándor Szathmári naskiĝis en 1897, kaj, vivante alterne sur hungara kaj rumana teritorioj, li jam infanaĝe „devis ekkoni la naciajn antagonismojn, kiujn mi neniam povis kompreni kaj konsideris jam dekomence sensenca malfaciligo de la vivo. . . . Tiuj spertoj donis al mi la unuajn instigojn fariĝi esperantisto" (citaĵo el la aŭtobiografieto, p. 426). Laŭprofesie li estis inĝeniero, kaj libertempe li verkis en la hungara lingvo kaj en Esperanto. Same kiel Zamenhof, li sentis la bezonon evoluigi inter la homoj la konscion pri la tuthomaraj problemoj, kaj tiusence ambaŭ estas pioniroj de la „nova pensado" iniciatita de M. Gorbaĉov en nia tempo. Sed, kontraŭe al Zamenhof aŭ Gorbaĉov, Szathmári ne eksplikas proponojn al la homaro, sed li verkis romanon („Vojaĝo al Kazohinio") kaj novelojn kaj rakontojn kun pesimisma sinteno. Liaj spertoj el du mondmilitoj kaj el diversaj politikaj reĝimoj kondukis lin al senespereco rilate al la homara estonteco. Mi citas denove el la aŭtobiografieto:

„La teĥniko tute aliformigis nian medion, sed ne povis aliformigi niajn instinktojn, kiuj ankaŭ nun konformas al la pramedio, al la iama besta vivo, al la stato de la ‚Batalo por la vivo/, anstataŭ la nun jam aktuala ‚paco por la vivo'. Nun ni estas en grava krizo. Se ni ne povas niajn instinktojn akomodi al nia maŝinigita medio . . ., ni pli aŭ malpli frue ekstermos nin mem pere de la maŝinoj. Ĉu pesimista mondvido? Jes. Sed ĝi montras

la vojon: ni devas almenaŭ bridi niajn instinktojn, ekkoni ilin kaj teni la tigron en kaĝo. Ni ne povas nian naturon aliformigi, sed la vekiĝo de la konscio eble povus regi ĝin. ... La evoluo de la teĥniko estas nehaltigebla procezo, kiun marŝigas la armea konkurado nerezisteble al la ŝtupo, kiam la homaro devas cedi al la postuloj de sia nova medio aŭ perei!"

Tiuj citaĵoj atestas pri la aktuala enhavo de la verkoj de Szathmári. Pro tio estas ege laŭdinda ago de HEA nun eldoni la plenan novelaron de la aŭtoro.

Tute ne eblas recenze prilumi la novelojn en malmultaj linioj. Pli gravas konsciigi la genion de la aŭtoro: En 1964, kiam la komputiloj havis la formon de ŝrankegoj kaj ne multon povis plenumi, li prognozis la glorajn kaj la vivdanĝerajn eblecojn de ilia „Maŝinmondo". Same genie li antaŭvidis la aperon de muzikon komponanta komputilo („kompofono").

La satiro „Perfekta civitano" kvazaŭ pruvas, ke ne eblas „konstrui la idealan civitanon, en kiu koncentriĝas ĉiuj virtoj de la subulo", ĉar „tiom multe povas plenumi nur la animhava konsciplena homo."
La lingvaĵo de Szathmári montriĝas bone legebla. Kelkaj formoj diferenciĝas de la normala lingvouzo, kio tamen ne malhelpas la komprenon (ekz.: „mi **per**kursis la fakultaton", p. 426; „ĉiokaze", p. 430).
Resume mi diru, ke la ideoj de la aŭtoro mirige konformas al la tuthomara „nova pensado", kaj ili per pesimismaj opinioj helpas serĉi vojojn al pli sekura kaj pli homa futuro.

Michael BEHR

Milda fifro jam eksonis. Bulgara popola ampoezio. Eldonanto: Bulgara Esperantista Asocio, Sofio 1986, 58 p.; elekt. kaj trad. Ljuba Bojaĝieva

El pli ol cent mil bulgaraj popolkantoj el diversaj etnografiaj regionoj de Bulgario elektitaj, Bulgara Esperantista Asocio prezentis kelke da belegaj amkantoj.
Kiu, se ne la bulgaraj homoj mem, ŝatas la bulgaran popolan ampoezion. Sed la eksterlandaj legantoj kaj aŭskultantoj unue devas enprofundiĝi en la emociriĉajn versojn, devas kompreni la kutimojn kaj morojn.
Tiel estas ekkoneble, ke la ampoezio esprimas la ĝojojn, zorgojn kaj sentojn, precipe de la bulgaraj junulinoj, sed ankaŭ la vivsaĝecon de la maljunuloj.
La vivon en la familio, en la fremda hejmo por la edziniĝinta fraŭlino, la zorgojn pro la infanoj, ĉion ĉi respegulas la versoj. Kaj bulgarajn tradiciojn kaj severajn morojn, la idealon de la bulgaro oni ekkonas kaj ankaŭ la atmosferon de animpureco.
Nekutimaj estas la mankantaj rimoj ĉe la ampoeziaĵo, kiuj certe riĉigus esprimivan kaj enhavan belecon de la bulgara ampoezio.
La kovrilo de la broŝuro estas grafike farita kaj orientigas al la enhavo de la versoj.
Kiu ŝatas amversojn, kiu deziras konatiĝi kun bulgara ampoezio kaj kiu estas scivolema, tiu legu ĉi tiun broŝuron.

Monika Schrage

Renkontiĝo en Sovetunio

De la 12-a ĝis la 18-a de oktobro 1989 en la hotelo „Drogobiĉ" de la samnoma okcidentukrajna urbo okazos internacia renkontiĝo de esperantistoj.
La partoprenontojn atendas riĉa programo: interkona vespero, novaj filmoj pri Japanio kaj Brazilo de la pola reĝisoro Roman Dobrzynski, lignofajro, folklora koncerto, aŭkcio, inaŭguro de internacia fotoekspozicio „Esperanto, Paco, Planedo, Ni", ekskursoj k.s.
Turnu vin al la adreso: Vasil Stanoviĉ, 293720, Drogobiĉ, Lvov obl., PK. 20, Sovetunio, kun jenaj indikoj: nomo, naskiĝdato, adreso, profesio, dato kaj subskribo. La partoprenkotizon (78 rublojn) vi pagos surloke.

ITRE '89

Jam la 12-an fojon okazos la ŝatata dulanda turisma aranĝo sub la mallongigo ITRE (= Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj en Ercmontaro). Ĉifoje en la ĉeĥa ercmontara urbeto Boži Dar (Distrikto Karlovy Vary) de 17-a ĝis 23-a de septembro 1989.
La kompleta partopreno (inkluzive tranoktojn kaj manĝojn) kostas 600 ĉeĥaj kronoj. Interesiĝantoj tuj sin anoncu ĉe Miloš Bloudek, Vyšehradská 4, 36001 — Karlovy Vary, ČSSR. La nombro de partoprenantoj estas limigita je 60.

Manuel Cofiño: La lasta virino ..., Havano, Eldonejo José Marti, 188 paĝoj

La apero de esperantigita romano el Kubo salutindas ne laste ankaŭ pro trafa elekto de la verko. „La lasta virino ..., tradukita en multajn lingvojn kaj gajninta la plej gravan latinamerikan literaturan premion (Premio Casa de las Américas, 1971), estis la unua romano, amplekse prezentanta la konfliktoplenan ekkonstruon de la socialismo en Kubo. Ĝi rakontas pri la ŝanĝoj de la vivkondiĉoj kaj pensado en arbarkultura regiono, realigitaj en la lukto kontraŭ la reakcio, pri la ĉiutaga vivo de la popolo, la amo, la naturo, ... Retrorigardoj kaj citado de mitaj popolaj rakontoj respegulas la fonon de la tiutempaj situacio kaj evoluoj.

Ne plene kompreninte, ke Esperanto jam estas lingvo, disponanta pri gramatikaj reguloj, uzata leksiko, diversaj stilistikaj ebenoj ktp., la tradukinto de la romano, Arnoldo Aguila, ne observas (aŭ ne konas?) multajn lingvajn normojn. Jen kelkaj ekzemploj:

— invento de la tute superfluaj pronomoj arli (por viroj), arŝi (virinoj) kaj arĝi (aĵoj); „La proponoj ... estas eblaj ... pro ke Esperanto estas nenies proprajo." (181) Sed ĝi ja estas ies „proprajo"; tiu de siaj parolantoj!

— invento de la nenecesa pronomo uli, t.e. „li aŭ ŝi"

— uzo de la participaj finaĵoj -uta kaj -unta, ne ekzistantaj en Esperanto; ekz.: „terĝibo el terajo kvazaŭ faruta de formikoj" (9), „Dronunta en siaj pensoj Bruno manĝas ... (50)

— kreo de novaj tabelvortoj (aliu, aliam ktp.), kio ne eblas, ĉar kion signifu alie (ĉu aliloke aŭ alimaniere)?

— anstataŭigo de terpomo per potato: „Kun via permeso mi renomu ĉi tuberon Amerikan antaŭe misnomata ‚terpomo'." (186)

Francoj, germanoj, ĉeĥoj, ..., ne uzu la aĉajn vortojn pomme de terre, Kartoffel, brambor, ... Diru potato!

— ofta uzo de vortoj preskaŭ ne konataj (hati, vanui, mava, men, poka, live, lontana ktp.) por eviti „mal-"vortojn

— anstataŭigo de devi per endi; ekz.: „... poste li endis foriri ..." (14)

— neuzo de necesaj pronomoj; ekz.: „Kiam ŝi kunas kun Siako ne pensas, nur sentas kaj ne pli. (25)

— uzo de koni anstataŭ scii; ekz.: „Sed ... kial ili restis? ... Ja tion mi ne konas ..." (13)

— erara uzo de ĉu; ekz.: „Ĉu kion havas Nata en la voĉo ...?" (18)

— elizio post kaj: „kaj l'noktoj" (14), „kaj l'preĝoj" (63) ktp.

— akuzativaj eraroj; ekz.: „... por ke vi trinku akvo ..." (130), „Ĉu ekzistas ian numeralan arĥivon tie ĉi?" (65)

— elizio, praktike rezervita por stilistike altaj tekstoj, en ĉiutagaj eldiroj de simplaj laboristoj.

Oni povus laŭvole plilongigi tiun liston. Krome menciendas, ke la tradukinto esperantigis proprajn nomojn (Anastasio Riveroj — A. Rios, Deziritinoj — Las Desdeadas ktp.). Tiaj tradukoj eblas, sed malbelas.

„Estu nia lingvo ĉiutage pli riĉa, pli vivipova, pli bela." (Aguila, 183) Bone, sed por tio unue uzu ĝin korekte. Elpensaĵoj, bazantaj sur troa teoriumado, kaj neobservo de ekzistantaj lingvaj normoj ne taŭgas.

Uwe Werner

Nova prezidanto de la DE Rostock

Ni dankas al Paul Linke, kiu gvidis la Distriktan Estraron de GDREA Rostock, kaj salutas kiel novan prezidanton s-ron Uwe Hübner el Stralsund.

Vojaĝo al Hirošima

Sub ĉi tiu titolo Hirošima Esperanto-Centro eldonis gvidilon pri la memorejoj pri la atombomba eksplodo super la centro de la japana urbo Hirošima. La kajero dulingve — Esperante kaj japane — informas vizitantojn kaj ankaŭ legantojn en la malproksimo.

Mi legis ĝin dum la tagoj, dum kiuj homoj tutmonde rememoris je la 43-a fojo la viktimojn de ĉi tiu krimo de la usonaj politikistoj je la 6-a de aŭgusto 1945 kaj postulis la neniigon de ĉiuj atomarmiloj. Al tiu celo volas servi la presaĵo per 60 paĝoj da teksto, blankaj-nigraj fotoj kaj plano pri la situo de la objektoj en Paŭa Parko Hirošima. Ĝi imprese kaj konvinke realigas ĉi tiun taskon. La vizitanto estas gvidata tra la parko kaj tre detale tra la Pacmemoriga Muzeo. Li ekscias, ke la monon por la cenotafoj, monumentoj kaj muzeoj donacis homoj el ĉiuj tavaloj de la japana loĝantaro kaj eĉ infanoj kaj fremdlandanoj.

La leganto ricevas viglan bildon pri la vivado en Hirošima rekte antaŭ la eksplodo de la bombo kaj la amasa mortado dum kaj post la eksplodo, pri la brulanta urbo, pri la fugado de la vunditoj, pri la sinoferemaj sed preskaŭ en ĉiu kazo sensukcesaj penadoj, helpi al la malsanuloj, entombigi la mortintojn. La ekzaktaj kaj skrupulaj informoj pri la nombroj de la mortintoj kaj malsanuloj, pri la amplekso de la detruoj, pri la materialaj damaĝoj, pri la fizikaj efikoj de atombomba eksplodo kaj pri la malsanigaj efikoj de radioaktiva radiado alparolas la racion de la leganto. La priskribo de individuaj sortoj elvokas fortajn emociojn. Ambaŭ efikoj kaŭzas laŭ mi la valoron de la broŝuro. Fine ĝi entenas informojn pri la esperantistoj en Hirošima.

Hans Rogazewski

Laste aperis

— Atoma klarigo de materialproprecoj. Rob Vetter. Pekino: Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio, 1988 (jaro neindikita). 180 p. 26 cm. Fizika faklibro kun formuloj kaj novaj terminoj, malmultekoste preparita i.a. por studentoj en evoluaj landoj.

— Ĉinaj protektataj bestoj. Ĉefred. Ĉen Šjaŭji. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 350 p. 14 x 21 cm. Ilus. Bildoj kaj priskriboj de pli ol 150 famaj aŭ raraj bestoj de Ĉinio.

— Gimnazio, La. Šalom Alejĥem, el la jida esperantigis L. L. Zamenhof, el Esperanto japanigis Nozima Yasutarô (dulingva eldono). Japanlingvaj komentoj de Sakamoto Syôzi. Osako: Japana Esperanta Librokooperativo, 1988. Humura monologo laŭ la eŭropjuda tradicio, el La Revuo (1910).

— Kapao, La, kaj aliaj rakontoj. Akutagawa Ryúnosuke (1892—1927), el la japana trad. Nozima Yasutarô Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1979 (represo el 1954). 94 p. 18 cm. Kvar noveloj de unuaranga verkisto, satiraj kaj distraj.

— Katalogo de Esperantaj poŝtmarkoj. Komp. Song Shenthan. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 116 p. 18 x 9 cm. Kolorilus. Zorga registro de ĉiuj E-poŝtmarkoj el la unuaj cent jaroj, kun filatelaj detaloj kaj plenkoloraj reproduktoj.

— Krestomatio de Esperanto. Ĉefkompilinto Wei Yuanshu. Šanhajo: Šanhaja Fremdlingva Aŭdvida Eldonejo, 1988. 600 p. 20 cm. Dulingva. ISBN 7-81009-061-5. Tradukitaj kaj originalaj verkoj en Esperanto, kun ĉinaj tradukoj, detalaj Esperantaj notoj pri la aŭtoroj kaj lingvaĵo, kaj ekzercigaj demandoj.

— Vojaĝo de amikeco tra eŭropa Esperantujo. Parto 1, „Oriento". Mizuno Yoshiaki (1934—). Tokio: Esperanta Libro-Eldonejo de Tokio, 1988 (2-a reviziita eld.). 72 p. 21 cm. Fotoj. Raporto pri trimonata gastvojaĝo en 1985.

— Zamenhof, oĉe esperanta. Marjorie Boulton (1924—), el la angla trad. Franc Šrimpf. Maribor: Obzorja, 1987. 272 p. 21 cm. Bind. ISBN 86-377-0229-5. Slovena eldono de Zamenhof, creator of Esperanto.

— Abismo/Abyssos. Jano Lajpo kaj Rikardo Šulco (Hans Leip kaj Richard Schulz). Paderborn: Esperanto-Centro Paderborn, 1988. 78 p. 20 x 20 cm. Ilus ISBN 3-922570-51-8. Dudek kvar litografoj de populara germana aŭtoro, kun akompanaj sonetoj kaj enkonduka eseo dulingvaj de Šulco: „hororaj vizioj" pri la mondo.

— Aglutinaj lingvoj kaj Esperanto, André Cherpillod (1930). Montmirail: la aŭtoro, 1988 (loko neindikita). 24 p. 21 cm. ISBN 2-906134-06-6. Simpla, klara tipologia prezento, kun multaj ekzemploj.

— Akademiaj studoj 1987. Red. Rüdiger Eichholz (1922). Bailieboro: Esperanto

Press, 1988. 156 + 204 p. 29 cm. Lingvaj studoj kaj opinioj de dudeko da esperantistoj (ne nur akademianoj). La duan duonon konsistigas terminologia reformprojekto de Manuel Halvelik, „Terminfarada Ŝlosilo" (1987).

— Aldono to English Phrases and Expressions in Esperanto. F. M. Woolf. Kaburbo: la aŭtoro, 1988 (loko kaj eldonejo neindikitaj). 52 p. 21 cm. Kompletigo al la konata tradukilo por anglaj idiomaĵoj.

— Aleo aŭtuna. Lidia Ligęza. Krakovo: la aŭtoro, 1987. 32 p. 20 cm. ISBN 83-85033-02-5. Lirikaj liberversaĵoj, trafe priskribaj pri la ĉiutaga vivo.

— Avineto Luno. Lin Songjing. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 20 p. 21 cm. Kolorilus. de Ĝang Ĝjiping. Du rakontetoj por infanoj.

— de moseo al andersen. Red. ludovikito. Nagojo: Eldonejo Ludovikito, 1988. 502 p. 21 cm. Iam kompletigota plena verkaro de Zamenhof, parto dua (tradukajoj), volumo 4. Represoj el La revuo, aprilo 1910-julio 1914 (el La biblio, La rabeno de Baĥarah kaj Fluganta kofro).

— Dirdri kaj la filoj de Usnah, Adriaan Roland Holst (1888 — 1976), el la nederlanda trad. Christian Declerck. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1988. 52 p. 21 cm. Serio „Stafeto" n-ro 8. ISBN 90-71205-24-X. Rerakonto de kelta legendo, kies ĉefrolanto estas „kvazaŭ ekzilito sur la teron".

— Esperanton suhtautumisen psykologiaa. Claude Piron, el Esperanto trad. Osmo Buller. Helsinko: Esperanto-Asocio de Finnlando, 1888. 16 p. 21 cm. Esperantovihkot n-ro 1. Finnlingva versio de „Psikologiaj reagoj al Esperanto" (Esperantodokumento 26E).

— Gaja mondo. Zofia Mirska. La aŭtoro, Pollando 1987. 16 p. 21 cm. Mimeo. Ilus. Poemetoj por infanoj.

— Konstruado en alto, La. Otokar Březina (1868 — 1929), el la ĉeĥa trad. Theodor Kilian (1894 — 1978). Třebič, 1982. 12 p. 21 cm. Eseeto de granda poeto, pri la signifo de homa kreado kaj laboro.

— Konvero. Jindřich Novák kaj Ivan Špička. Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1987. 32 p. 20 cm. Ilus. Faklibreto pri ĵudo-tekniko.

— Lingvoj en Eŭropo. Statistiko kaj iomete pli. Kompilis Uwe Joachim Moritz. Eschweiler: Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, 1988. 36 p. 21 cm. Mapo. Klarigo de la „etnisma" filozofio pri la rajtoj de minoritataj lingvoj.

— Nepivaj vortoj. André Cherpillod (1930). Montmirail: la aŭtoro, 1988 (loko neindikita). 180 p. 21 cm. ISBN 2-906134-05-8. „Listo de 6800 vortoj ne troviĝantaj en la PIV, el kiuj kelkaj povus esti utilaj." Kun font- kaj etimologiaj indikoj.

— Postmilita japana antologio. Komp. Odagiri Hideo, Miyamoto Masao kaj Konisi Gaku. Osako: Japana Esperanta Librokooperativo, 1988. 320 p. 22 cm. Bind. Noveloj (kaj unu dramo) de 12 aŭtoroj, spegulantaj la disvolviĝon de la japana popolo post 1945.

— Qu Yuan. Historia dramo en kvin aktoj. Guo Morguo (1892 — 1978), el la ĉina trad. Laŭlum. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 120 p. 22 cm. Fotoj. Bind. Dramo el la jaroj de la ĉina revolucio, kiu trovis en la 4-a jarcento a. K. aktualan mesaĝon.

— Ridinda flanko de l' mondo. Komp. Djuro Jančí, trad. Josip Pleadin. Djurdjevac: la kompilintoj, 1988. 32 p. 19 cm. Ilus, Šercoj kaj aforismoj.

— Turystyczny słownicek polsko-esperancki. Regina kaj Andrzej Grzębowski. Bydgoszcz: Centralny ośrodek informacji 52 p. 15 cm. Turisma ŝlosilo.

— Urbi et orbi. Karolo Pič (1920). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1988. 18 p. 21 cm. „Repliko al Valerio Ari (t. e. Giorgio Silfer)": defendo de la aŭtoraj principoj pri literatura vortkreado.

— Jubileo — jarcento de Esperanto. Div. aŭtoroj, komp. kaj red. Mark Fettes. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1988. 164 p. 24 cm. Ilus. ISBN 92-9017-040-9. Belaspekta kolekto de artikoloj, raportoj kaj fotoj el la Jubilea Jaro: resumas la etoson kaj idearon de la movado okaze de ĝia centjariĝo.

— Kanaano (1901). Graca Aranha (1868 — 1931), el la portugala trad. Caetano Coutinho. Brasilia: Brazila Esperanto-Ligo, 1987. 188 p. 21 cm. Ilus. Du germanaj enmigrintoj en 19a- jarcenta Brazilo kunportas kontrastajn viv- filozofiojn, kiuj stampas iliajn reagojn al tiu ĉi „promesita lando".

— Kio estas nun lingvo por internaciaj interŝanĝoj? Tokio: 74-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, 1988. 74 p. 21 cm. Dulingva plena raporto de simpozio el 1987, kiu komparas Esperanton kun la lingvoj angla, franca, japana kaj korea, rilate ilian rolon en la komunikado de Japanio kun aliaj landoj.

— Laŭdo de l' stulteco (1511). Erasmo de Roterdamo (1469? — 1536), el la latina trad. Gerrit Berveling. Enkonduko de Albert Goodheir. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1988. 112 p. 21 cm. Ilus. de Hans Holbein la Juna (1497 — 1543). ISBN 92-9017-039-5. Ŝlosila verko el la eŭropa transiro al humanismo; satira, sprita argumento por la valoro de la homaj pasioj.

— M. Hernández, poeto de l' popolo. El la hispana trad. Miguel Fernández. Valencia: Grupo Esperanto de Valencia, 1988. 155 p. 18 cm. ISBN 84-404-2551-1. Reprezenta poemaro de popularega lirikisto, mortinta en 1942 sed inspirinta la junularon de la 60-aj kaj 70-aj jaroj.

— Muelejoj en Nederlando. C. P. Braay, el la nederlanda trad. Ru Bossong. Zaandam: Kooijman, 1988. 32 p. 21 cm. Kolorilus. ISBN 90-71816-08-7. Riĉe ilustrita enkonduko.

— Murdo en Esperantujo. Daniel Moirand. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1988. 172 p. 21 cm. Serio „Stafeto" n-ro 5. ISBN 90-71205-20-7. Nekonata homo enfalas morta la monatan kunvenon de Esperanto-klubo Rumsheim: ĉu nur hazardo, ĉu io pli minaca . . .?

— Ni kaj Ĝi. Gaston Waringhien (1901 —). La Laguna: Stafeto, 1973. 346 p. 22 cm. Belliteratura serio n-ro 30. Erudiciaj kaj

elegantaj eseoj pri religio kaj arto, verkitaj en klara kaj alirebla stilo.

— Oficiala situacio de la Esperanto- instruado en la mondo, 7-a eld. Germain Pirlot. Oostende: la kompilinto, 1988, 1988. 34 p. 21 cm. Mimeo.

— Oktobro kaj la rekonstruo: la revolucio dauras. Mihail Gorbaĉov, kolektive trad. el la rusa. Moskvo: APN, 1987. 70 p. 19 cm. Raporto de la sovetia gvidanto okaze de la 70-a datreveno de la Oktobra Revolucio.

— Parolado prononcita de lia prezidenta moŝto Didier Ratsiraka. El la franca trad. Roger Randrianekena. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1988 (neindikita). 30 p. 21 cm. Mimeo. Parolado okaze de la 40-a datreveno de Unuiĝintaj Nacioj (1985), en kiu la madagaskara ŝtatestro pledas por radikala solvo al la vetarmado.

— Disko (granda): Veselin Damjanov kantas en Esperanto. Sofio: Balkanton, 1978. Naŭ tradukitaj kaj tri originalaj kantoj de la profesia bulgara baritono.

— Kasedo: Quizas. Zagreb: Lisinski, 1988. Kantoj el la 44-a Internacia Junulara Kongreso.

— Studkompleto: Esperanto programita (nederlanda versio). Inkluzivas vortaron (Middelkoop), lernolibron kaj kasedon (Hermann Behrmann, trad. Paul Peeraerts). Celita por aŭtodidaktoj.

— Vidbendo: En Eŭropo ie. Budapeŝto: Hungara Dublad- kaj Video-Kompanio, 1987. VHS, 80-minuta. Klasika post-milita filmo pri bando de orfoj, kiuj serĉas hejmon en ruiniĝinta Eŭropo.

— Vidbendo: Mefisto. Budapeŝto: Hungara Dublad- kaj Video-Kompanio, 1988. VHS, 140-minuta. Oskar-premiita filmo pri talenta aktoro sub la nazia reĝimo, dublita en Esperanto de hungaraj profesiuloj.

— Amo, amoro, adoro. Mira Andrusiewicz. Jelenia Gora: Socikultura Societo kaj Pola Esperanto-Asocio, 1987. 67 p. 20 cm. Ilus. Poemoj verkitaj originale en Esperanto.

— Anne Frank ne estas de hieraŭ. Mies Bouhuys. El la nederlanda trad. Nora Bartels. Apeldoorn: FELUA, 1988. 194 p. 21 cm. Grandlitera. Mapo. Rakonto pri la juda knabino en Amsterdamo, kies taglibro fariĝis fama atestaĵo pri la kontraŭhomeco de la naziismo.

— Brilas saĝo. Uang Zikun k.a. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo 1987. 206 p. 18 cm. Ilus. 66 eseetoj pri bazaj sciencoj kaj modernaj teknikoj.

— En fremda urbo. Arvo Valton. El la estona trad. Antonina Apollo. Tallinn: Eesti Raamat, 1987. 263 p. 16 dm. Noveloj kaj miniaturoj de la „estona Ĉeĥov" kun „multege da Gogol kaj sufiĉa doozo de Kafka".

— Esperanta bildvortaro. Kompilis Rüdiger Eichholz. Bailieboro: Esperanto Press, 1988. 880 p. 19 cm. Ilus. Kun terminoj por 25 000 objektoj difinitaj per bildoj.

— Esperanta medicina revuo" kaj „Medicina internacia revuo" (1951 — 1986). Komp. Saburó Yamazoe. Maebasi: la aŭtoro, 1987. 28 p. 21 cm.

— Esperanta rimvortaro. Jonathan Cooley. Egham: la aŭtoro, 1987. 79 p. 21 cm. Enhavas preskaŭ 20 mil vortojn.

— Esperanto (1937), L. L. Zamenhof, en la portugalan trad. Ismael Games Braga. Rio/Brasília: Federacao Espríta Brasileira, 1987 (3a eeld.). 112 p. 18 cm. Dulingva eldono de „Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia".

— Esperanto-modelo (1938). L. L. Zamenhof k.a., red. Ismael Gomes Braga, antaŭparolo de A. Caetano Coutinho. Rio/Brasília: Federacao Espríta Brasileira, 1987 (2a eld.). 224 p. 18 cm. La zamenhofaj Ekzercaro, Lingvaj Respondoj, kongresaj paroladoj kaj „Esenco kaj estonteco", plus kelkaj truaj tradukoj fare de aliaj el la brazila literaturo.

— Esperanto-Türkce Sözlük. Esperanto-turka vortaro. Bekir Karayel. Ankara: la aŭtoro, 1987 (ne indikita). 222 p. 16 cm. Unudirekta.

— Laŭtema vortaro Esperanto-angla-ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 211 p. 19 cm. Bind. Pli ol sep mil Esperantaj konvortoj kun ekvivalentoj en la angla kaj ĉina.

— Litovio hodiaŭ. Div. aŭtoroj, el la litova trad. K. Puodenas. Vilnius: Mintis, 1987. 6 p. 20 cm. ISSN 0235-0769. La unua Esperanta numero de revuo eldonata ankaŭ en la rusa, angla, germana kaj franca lingvoj.

— Poezia arto, La. Baldur Ragnarsson. Kvin prelegoj faritaj en la kadro de la 26-a Kultura Semajnfino de SEL. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1988. 55 p. 20 cm. Profunda pritrakto de kelkaj esencaj ecoj de la Esperanta poezio, ekzemple la „pasiva-romantika" kaj „aktiva-intelekta" sintenoj.

— Sukero, nutrado, kario. Renate kaj Walter Klag. Vieno: la aŭtoroj, 1988. 16 p. 21 cm. Mimeo. Faktoj pri sukero kaj la homa sano.

— Tibeto sur la monda tegmento. Komp. la Redakcio de EPĈ. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1987. 132 p. 27 cm. Kolorilus. Pri historio, geografio, kulturo ktp.

— Volapükabled, n-ro 4. Red. Reinhard Haupenthal. Scheidt: Artur E. Iltis, 1988. 88 p. 21 cm. ISSN 0179-1931.

— Instrukompleto: Bestetoj, bestegoj kaj bestaĉoj (Bichinhos, bichóes e bicharocos). Sylla Chaves. Rio de Janeiro: Brazila Esperanto-Ligo, s.d. Esperanta kaj portugala libretoj, dulingva kasedo, 65 koloraj diapozitivoj. Versajoj, muzike akompanataj, por uzo kun ilustraj lumbildoj.

— Kasedo: En fora lando . . . Kantas Ramona van Dalsem. Hago: Internacia Esperanto-Instituto, 1988. Dek kvar originalaj kantoj, kun akompano de la grupo Sento Oriental'.

— Videokasedo: La graveco de la fideliĝo. Oskar Wilde. El la angla trad. William Auld. Londono: Brita Esperanto-Asocio, 1987. VHS-videokasedo de jubilea prezento en la teatrejo Bloomsbury, Londono, en julio de 1987.

— Kasedo: Imagu! John Douglas. Londono: Brita Esperanto-Asocio, 1987. 12 modernaj kaj tradiciaj kantoj, tradukitaj el la angla de W. Auld, H. W. Holmes kaj R. Rossetti.

— Instrukompleto: Kantu kaj lernu. Sylla Chaves. Rio de Janeiro: Brazila Esperanto-Ligo, 1983. Portugallingva kurso kun 4 diskoj, murafiŝo, gvidlibro kaj 6000-vortelementa legolibro.

— Mi estas esperantisto. Kiel mi akitvas, kiel ĝuas? Smail Grbo. Borovo: Voĉo, 1988, 136 p. 17 cm Ilus. Nekutima kolekto de rakontoj kaj opinioj de iusence malordinara movadano.

— Pasporta servo 1988 — 1889. Budapest: TEJO/Hungara Esperanto-Asocio, 1988. 70 p. 20 cm. 15-a eldono de la listo de gastigantoj: ĉ. 900 el 58 landoj (sen mapoj).

— Pasporto vegetarana. Komp. Menno Abbas k.a. Noordlaren: Nederlandse Vegetariersbond, 1983. 80 p. 22 cm. Mapoj. Klarigo pri la manĝbezonoj de vegetarano/vegetalano en 72 lingvoj.

— Patrina koro. Nevena Nedelĉeva. Rotterdam /La Laguna: UEA/Stafeto, 1988/1975 (eldono/preso). -148 p. 17 cm. Beletraj Kajeroj 47. Simplaj, romantikaj, rakontoj pri la esperantista vivo.

— Paŭlo Lengyel: esperantista prezisto, jurnalisto, akademiano. D-ro Mihály Szilágyi. Szekszárd: Szeksárzdi Nyomda, 1988. 136 p. 20 cm. Bind. ISBN 963-01-88-70-8. Dulingva eldono de biografia studo pri ŝlosila movada pionira (1868 — 1932; i.a. eldonanto de LINGVO INTERNACIA); kun krestomatieto el ties artikoloj.

— Perfekta civitano. Plena novelaro de Sándor Szathmári (1879 — 1974). Bibliotrafio komp. de Karl Pov; postparolo de Vilmos Benczik. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1988. 456 p. 20 cm. ISBN 963-571-178-6, Ĉiuj 27 noveloj, satire akraj aŭ filozofie pensigaj, de unu el la plej grandaj Esperantaj prozistoj.

— Praavo kaj la kotokukoj. Sigrún Eldjárn, el la islanda esperantigis Ragnar Baldursson, japanigis Sari Ohyam. Tokio: Libroteko Tokio, 1988. 28 p. 18 x 25 cm. Bind. Kolorilus. Ĉarma dulingva rakonto pri kvarjara knabino kaj ŝia kunludema praavo.

— Proverbaro Esperanto. L. L. Zamenhof (1859 — 1917), ordigis kaj provizis per indeksoj Camille Rogister. Enkonduko kaj postparolo de Gaston Waringhien. La Laguna: Stafeto, 1974. 168 p. 19 cm. Beletraj Kajeroj 10. La plej bona edlono iam preparita de la 2630 zamenhofaj proverboj.

— Provizora privata listo de komunlingvaj nomoj de plantoj de nordokcidenta Eŭropo. W. F. Pilger. Lelystadt: Vulpolibroj, 1982 (kun aldona folio, 1988). 72 p. 21 cm. ISBN 90-70074-31-1. „Uzebla same por amatoraj botanikistoj kaj por homoj kiuj simple volas priparoli iujn sovaĝajn plantojn.

— Realo kaj garantioj de la sekura mondo. Miĥail Gorbaĉov, el la rusa trad. E. Ŝevĉenko kaj L. Novikova. Moskvo: APN, 1987. 16 p. 19 cm. Artikolo okaze de la 42-a sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN, kun proponoj por „universala sistemo de sekureco".

— Renovigan ideologion por la revolucia rekonstruo. Miĥail Gorbaĉov, kolektive trad. el la rusa. Moskvo: APN, 1988. 48 p. 19 cm. Parolado de la sovetia gvidanto en la Plenkunsido de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Sovetunio, feb. 1988; unu el la gravaj priskizoj de la t.n. „perestrojko".

— Sankta Johano. Swindon: La Brita kaj Alilanda Biblia Societo, 1988. 36 p. 13 cm. Poŝformata represo de la kvara Evangelio.

— Simha. Rakonto pri ĝojoj. Isak Samokovlija (1889 — 1955), el la serbokroata trad. Jovan Zarkoviĉ. Antaŭparolo de Ivo Andriĉ, postparolo de Stanŝa Tutnjeviĉ. Sarajevo: ELBiH, 1988. 110 p. 20 cm. Malriĉa ŝuisto trovas meze de la vivdezerto „oazetojn de ĝojo kaj feliĉo"; unu el la ĉefverkoj de sefarda bosnia rakontisto.

— Somera tago kaj Aŭtuna vespero. Inger Brattström, el la sveda trad. Malte Markhedren. Motala: Progreso Eldonejo, 1988. 52 p. 21 cm. ISBN 91-8732-03-7. Du noveloj pri juna paro, Anna kaj Daniel, kiuj lernas pli bone koni unu la alian dum someraj aventuroj.

— Surbaze de plena egalrajteco, suvereneco, reciproka respekto. Miĥail Gorbaĉov, kolektive trad. el la rusa. Moskvo: APN, 1988. 16 p. 19 cm. Parolado de la sovetia gvidanto en Beogrado, Jugoslavio, marton 1988, kie li i.a. agnoskis la rajton de aliaj socialismaj ŝtatoj al propravoja evoluo.

— Ŝia lasta poŝtkarto. Serĝo Elgo. La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro, 1988. 225 p. 21 cm. Subita kaj mistera malapero de junulino naskas tradician krimromanon, en kiu detektivo sekvas verajn kaj trompajn fadenojn al la „guŝta solvo" — aŭ ĉu?

— Tentiĝoj de Adamo, La. A. Lopez Luna (1914 —). Buenos Aires: Amigos de Lopez Luna, 1987 (neindikita). 104 p. 17 cm. Mimeo. ISBN 950-43-1688-3. Rakontetoj pri la rilatoj al virinoj de la aŭtoro.

— Esperanton kielioppi. Veli Kolari. Hyvinkää: Oy Mendoservo Ak, 1988, 44 p. 21 cm. ISBN 951-96076-7. Konciza finnlingra gramatiko.

— Vojaĝoj finiĝas, amantoj kuniĝas. Manjo Austin. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 1988. 128 p. 21 cm. Serio „Stafeto" n-ro 6. Plenkresko de adoleskulino en trankvila irlanda urbeto, rakontita senmetafore sed ne sen romantiko.

— Vortaro Esperanta-hebrea kun krestomatio. Komp. d-ro Henryk Mashler, red. kaj kompletigis Josef Murjan. Tel-Aviv: Esperanto-Ligo en Israelo, 1987. 55 p. 23 cm.

— Une langue de communication internationale: l'espéranto. Raymond Gueguen. Limoges: la aŭtoro, 1988, 50 p. 21 om. ISBN 2-9501857-2-X. Bazaj informoj pri la movado.

— Une langue pour tous: l'espéranto. Eduardo Vivancos. Paris: Groupe Fresnes-Anthony, Fédération Anarchiste, 1987, 64 p. 21 cm. „Volonté Anarchiste", ISSN 0181-43-89, n-ro 34. Dulingva (franca-Esperanta) versio de hispanlingva informilo el 1975.

DIVERSAJOJ

— Filatelaĵo: Kubo. Koverto unua kongreso (poŝtostampo).

KORESPONDDEZIROJ 31 6 35

GDR

Rainer Wollny, Fichtenstr. 14, **Dresden, 8060,** dez. kor. tutmonde pri muziko, vojaĝoj, literaturo, aŭtomobiloj.
Komencantino, 20j. pola studentino, dez. kor. tutmonde pri turismo, muziko, lingvoj: Dorota Lombara, Bl. 011/720, **Halle-Neustadt, 4090.**
Gekomencantoj, 28j. kuracisto (d-ro Uwe Reuter) kaj 30j. fizioterapeŭtistino (Carmen Schnellknecht) dez. kor. tutmonde pri turismo, medicino, literaturo, fotografado, muziko, trikado, vivmanieroj en div. landoj. Adreso: Kurt-Mittag-Str. 26, **Plauen, 9900.**
15j. komencantino dez. kor. tutmonde pri muziko, kol. pm: Isabel Hippe, Nossener Str. 9, **Marbach 9254.**
15j. komencantino dez. kor. tutmonde pri literaturo, muziko, bestoj: Yvetta Schubert, Hauptstr. 127, **Marbach, 9254.**
13j. komencantino dez. kor. tutmonde pri muziko, bestoj: Nicole Alex, Hauptstr. 77, **Marbach, 9254.**
Ute Teichmann, Wehrstr. 29, **Gößnitz, 7422,** dez. kor. tutmonde pri literaturo, muziko, ŝako.
Susanne Nestler, Sehmatalstr. 22, **Schönfeld, 9301,** dez. kor. tutmonde pri literaturo, muziko, vivo kaj kutimoj en div. landoj.
Mandy Jahn, Hauptstr. 162, **Marbach, 9254,** komencantino, dez. kor. tutmonde pri muziko, gitarludo, kol. pm.

Pollando

Esperanto-Klubo en Skierniewice aranĝos letervesperon okaze de la Internacia Virina Tago. Skribu al: Esperanto-Klubo, s-ino Czesława Kaczmarek, str. Sobieskego 13 m 27, **96-100 Skierniewice.**
Marko Górski, **44-100 Gliwice,** ul. Sienkiewicza 6/7, 28j., dez. kor. tutmonde p. ĉ. t., kol. bk. pm.
Krystyna Włodarczyk, ul. Skarzyńskiego 2/404/II, **31-627 Kraków,** 33j., dez. kor. tutmonde pri filmoj, teatro, sporto, naturo, vojagoj.

Mongolio

Kiu dez. ellerni azian pacan novan lingvon „Jazu hurö" skribu al: T. Bold- **Ulanbator 36,** domo, 10, pordo 97.

Japanio

19j. studento dez. kor. kun studentinoj el GDR pri Japanio kaj internaciaj rilatoj: Seiiĉiroo Takahaŝi, Kanameĉoo 2 — 3, **Iwatekengokuseirjoo Toŝima-ku**

Soveta Unio

20j. studentino dez. kor. tutmonde pri naturo, turismo, lingvoj: Ludmila Glod, **224005 Brest,** str. Dzerĵinskogo 3-342
15j. lernantino dez. kor. tutmonde pri sporto, muziko, kol. bk: Larisa Zjablova, **224023 Brest,** str. Leningradskaja 7-68.
Komencantino, 22j., dez. kor. tutmonde pri dancoj, muziko, sporto, turismo, kol. bk, pm: Rajana Raĵabajeva, **224023 Brest,** str. Moskovskaja 336/1-62.
Komencanto, 24j. kuracisto, dez. kor. tutmonde pri sporto, kuracado, vojaĝoj, lingvoj, kol. bk, pm: Aleksandr Bonzarevič, **224005 Brest,** str. Kooperativnaja 1-66.
E-poeto Mikaelo Ternavski, **333034 Simferopol-34,** ul. Kievskaja 86, kv. 26, dez. kor. tutmonde pri literaturo, vojaĝoj.
Komencanto dez. kor. tutmonde pri historio, lingvoj, muziko, numismatiko, kol. monerojn: Andrej Rjabov, 606029 Gorjkia regiono, urbo **Dzerjinsko,** str. Ciolkovskogo 49 „B" — 20
Elena Larinova, **248001 Kaluga,** ul. Suvorova 109-8, dez. kor. pri dekoraj hundoj

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: Otto-Nuschke-Str. 1, Berlin, 1080
Fernruf: 2 82 63 43
Verantw. Redakteur: Dr. sc. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Joachim Schulze. —
Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, Aue, 9400
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16